

Por ECI (Europa civitana Iniciativo) necesas 1.000.000 da subskriboj el minimume 7 diversaj EU-landoj;

kolektenda ene de 12 monatoj. Tamen indas subskribi rapide, por atingi la kvanton sufiĉe frue.

Bazajn informojn en Esperanto pri ECI vi trovos en vikipedio - kaj de tie estas ligoj por legi detale en 18 lingvoj.

https://eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa_civitana_iniciato

Kaj jen ĉio pri internaciaj tagoj, semajnoj, jaroj - en ĉiuj 6 UN-lingvoj:

<https://www.un.org/en/observances>

21a de Marto estas la Tago de la Arbaro

22-a de Marto estas la Tago de Akvo

22-a de Aprilo estas la Tago de la Tero.

05-a de Junio estas la Tago de la Naturmedio.

08-a de Junio estas la Tago de la Maroj.

26-a de Julio estas la Tago de Mangrovoj & de Esperanto

07-a de Septembro: Internacia Tago de Pura Aero kaj Blua Chielo.

19a de Novembro estas la World Toilet Day (grund-akvo, kaj perdo de mineraloj (P, K, NOx) se oni forĵetas la fekaĵojn - de la homaro.

Kaj jen ĉio pri internaciaj tagoj, semajnoj, jaroj - en ĉiuj 6 UN-lingvoj:

<https://www.un.org/en/observances>

La 7-a de Septembro: Internacia Tago de Pura Aero kaj Blua Chielo.

(dankon al Wolfgang Guenther)

Je fino de 2022 sur la Tero vivas 8 miljardoj da homoj !

2023-07-28 La homaro sur Tero foruzis kio eblintus dum la tuta jaro por nia planedo

===

==

2023-10-26 Raporto de Mazingira - novaj projektoj:

Mramba Simba , kelkaj el vi renkontis lin en Torino, sendis la raporton, ĉar ankaŭ AVE-anoj subtenis parte mi alkroĉas lian raporton - sen fotoj, ĉar kelkaj ne havas grandan spacon. Tiu raporto baldaŭ troviĝas sur nia retejo:

<http://www.verduloj.org/afriko.htm>

- En Januaro li plantos pliajn arbojn (inkluzive de frukt-arboj) sur la monton Tirin'gati. Li jam kulturis 500 arbidojn. Kaj tie bredas abelojn, kiuj liveras mielon - per kiu li povas subteni aliajn projektojn en sia vilaĝaro. AVE promesis 200 Euro por la planto-laboro, kaj (1 aŭ 2) dometon por 20 abeluoj - sed por tio ne sufiĉas la resto.

- Li volas kolekti pluvakvon de lernejoj tegmento - en cisterno. Por lavi manojn, ktp.; sed por trinki tiun akvon li planas filtrilon kaj disinfekciadon. Ankaŭ necesas 2 adiciaj necesejoj - unu por la instruistoj kaj alia aparte por knabinoj.

- Tingirima estas nomo de vilaĝo apud la parko Serengeti , for je 20 km for de mia vilaĝo. La loĝantoj tie estas lokaj terkulturistoj kaj kelkaj bov-bredistoj; sed bedaŭrinde ili povus nur trinki iliiajn bovojn per akvo el la rivero kiu troviĝas en la parko. La akvo en tiu rivero ne estas bona por trinki, pro tio oni petis nin helpi ilin per unu puto, per kiu ili povos akiri puran akvon por

trinkado kaj kuirado.

Ili jam fosis la puton, sed bezonas 2500 \$ por aĉeti pumpilon. Mi esperas ke la homoj devas pagi iomete por la akvo ?

- Por instrui Esperanton en la 2 mezlernejoj de la vilaĝaro, li bezonus monate 150 \$ ĉefe por pagi la instruisto(j)n.

- La plej granda projekto estas nova teknika kolegio por diversaj teknikoj, ĉar nur malmultaj lernantoj povas iri al pli foraj kolegioj. Por tiu celo (konstruaĵoj kaj ekipaĵoj) necesus 150.000 \$ - iu/ni (?) devus diskuti pri tio kun Mramba, kaj kiam ĉio klaras, trovi grandan fonduson.

- - -

2023-10-16 Malplibona alternativo - vaporigilo

Rob Moerbek sendis novan „Puraj Pulmoj“ - jen la plej grava kiun mi dissendas al vi. Se vi interesiĝas pli intense, bonvolu aliĝi al „Puraj Pulmoj“:

Sekr./Kas.: Rob Moerbeek: RobMoerbk@proton.me (nova retadreso)

UEA-kodo: tade-t. A-landanoj bv pagi po 5 eŭrojn jare, B-landanoj po 3,50

Karaj legantoj.

(necesas) ... enkonduki malpermeson pri la t.n. vaporiloj, elektronikaj cigaredoj kun enmetita ŝargo, ofte kun bongustaĵo. Tiuj “vap-oj” tre populariĝis inter junuloj. Allogas koloroj, odoroj kaj ĉefe dolĉaj bongustaĵoj, kvazaŭ manĝi frambon, vakcinion, avelpaston aŭ “mojton” (rumkoktelon kun i.a. sukero). ...

Kuracista kolektivo “Kuracistoj alarmas” avertas gepatrojn per interreto (TikTok). Laŭ esploro unu el tri gepatroj nun parolas kun sia infano pri vap-ado, 18% supozas ke la infano foje uzas e-cigaredon. Precipe lernejoj estas petataj malpermesi fumadon kaj vapadon sur la lerneja korto. Kaj informi pri la san-riskoj. ...

La plej danĝeraj sekvoj de fumado de e-cigaredoj, kvankam sen gudro kaj karbon-monooksido, estas la nikotina salo, kiu ne iritas la gorĝon sed rapide atingas la cerbon. Kaj ĝi dependigas, povas kaŭzi anksion, perdon de koncentro, poste vertigojn, eĉ DNA-degeneron kun epilepsia atako. Krome do facilas transiro al vera tabakfumado, sed ankaŭ uzado de fidoĝoj kaj alkoholo.

Oni longe submetis ratojn al e-cigareda vaporo: post jaro unu el kvar suferis pulmokanceron.

Plej gravas do konsciigi junulojn, ke la insida tabakindustrio ekspluatas ilin kiel anstataŭontojn de la nun ĉesantaj fumantoj. En Afriko kaj Azio ĝi donacas cigaredon al infanoj varbante estontajn klientojn. Krome ĝi respondecas pri senarbarigo, infanlaborigo en tabakplantejoj.

La batalo por “puraj pulmoj” daŭras: ni ne rezignu!

RM.

- - -

2023-08 Klimataj kaŭzoj de aviadiloj - necesas tutmonda imposto

Aparte la interkontinentaj flugoj havas trioble malbonan efikon al la klimato. Unue pro la granda eligo de CO2. Kaj pli granda pro la forceja efiko de la strioj en tre granda alteco. Eĉ la uzado de alternativaj fueloj ne reduktos tiun efikon en la stratosfero.

Jen vikipedio en pluraj lingvoj, sed ne en Esperanto.

https://de.wikipedia.org/wiki/Umweltauswirkungen_des_Luftverkehrs

(Kim Temmerling, taz 2023-08-04)

= =

2023-10 Mata Atlantica - pluvarbaro je la orienta borda regiono de Brazilo

Ege granda biodiverseco - multaj endemaj. Ek de la tempo kiam Gondwana dividiĝis antaŭ 100 milionoj da jaroj. Ekzemple la leono-simioj. Ili preskaŭ ekstermiĝis ĉar granda parto de la arbaro estis forhakita. Ekde kelkaj jaroj oni komencis la rearbarigon, kaj protekton de tiuj simioj kaj aliaj endemaj specioj.

<https://www.arte.tv/de/videos/085373-002-F/metamorphosen-die-wildnis-kehrt-zurueck/>

- - -

2023-10 Kastoroj denove en regiono de Devon - kio pri ĥaozo / kaozo ?

Dokumenta filmo pri la ekloĝado de kastoroj en la rivero Otter; (angla kaj germana nomo por lutrenoj !).

Kaj en eksperimenta granda tereno por kastoroj en proksima natur-rezervejo. Tie oni dokumentas la ŝanĝon de la biosfero. Ili faligas kelkajn arbojn, kaj sekve komenciĝas aliaj plantoj ekkreski. Sekve ankaŭ pli da insektoj, ekzemple diversaj libeloj troviĝas. Multigo de ranoj donas nutraĵon al grandaj birdoj. La barado pere de 13 digoj rezultigas ke la tereno ne plu elskiĝas, sed restas sufiĉe da akvo. Fakte eĉ purigita akvo, ĉar la akvo fluas malpli rapide, la plantoj povas elsuĉi mineralojn el tronutrita pro agrikulturo akvo.

Interesa temo - inundoj pro forta pluvo. Solvoj estas kapti la akvon sur la grandaj terenoj. Naturaj fosaĵoj, kie kelkfoje la akvo elfluas estis bremsita pere de malaltaj simplaj digoj. Kaj tiaj ankaŭ konstruas la kastoroj.

(filmo en la franca aŭ germana, 52 minutoj, videbla ĝis 2023-11-15)

<https://www.arte.tv/de/videos/085373-002-F/metamorphosen-die-wildnis-kehrt-zurueck/>

- - -

2015 eterne aktiva - municio kiu enhavas malriĉigitan uranion

Informo pri dokumenta filmo:

Deadly Dust / mortiga polvo - malriĉigita Uranio kiel parto de obuso

Dum la militoj 1995 kaj 1999 kontraŭ Serbio kaj en Irako Usonaj tankoj pafis obusojn kiuj estis fortigitaj pere de malriĉigita Uranio. Tiu estas kvazaŭ rubaĵo de la alriĉigo de uranio por atomcentraloj aŭ atombomboj. „Depleted uranium“ ankoraŭ enhavas radioaktivan uranion - la alfa-aktiveco estas 40% de la natura uranio (laŭ vikipedio).

Uranio (19 g/cm^3) estas preskaŭ duoble densa/peza ol plumbo (11,3); tial ĝi povas trairi dikan metalan tavolon (de tanko). Kaj nur ene okazas eksplodo.

Tiam la obuso disiĝas kaj iĝas polvo - radioaktiva polvo. Sed ne nur polvo: pro la frapiĝo je tiom alta rapideco tiu obuso iĝas ardanta, kvazaŭ fandas la metalon, kaj tiu ardanta polvo tuj ekbruliĝas ene de la tanko; tiel kaŭzas sekundaran eksplodon.

Tiu polvo restas kvazaŭ eterne aktiva, ĉar la duoniĝ-tempo estas 4,5 miljarde jaroj.

Se oni enspiras tiun polvon, ĝi kaŭzas kanceron - ekzemple leŭkemio, sed tiu radiado ankaŭ detruas la imunan sistemon. Krome la dissolvita uranio estas toksa en la renoj (eĉ se temas pri stabila uranio).

Edzinoj de tiaj soldatoj naskas misformitajn infanojn simile al tiuj en Ĉernobil aŭ en Semipalatinsk (videblaj en Alma Ata „Kunstkamera“ de la Medicina Universitato).

10-foja kancero, 20-oble naskiĝas (aŭ venas) misformitaj infanoj en Basrah, ne-kuraceblaj kanceraj infanoj.

Soldatoj en tiu milito mortis (ne pro iu eksplodo) pri la radiado - ekzemple Andre Horn - sed la administracioj ne volas scii ion pri tio.

Esploristoj ankaŭ trovis en tiu polvo en Irako ankaŭ tre malgrandajn kvantojn da U-236 kaj Plutonio, kiuj estas ege danĝeraj. Ili trovis tion en pulmoj kaj hepato.

Necesus formeti la detruitajn tankojn, forsuĉi polvojn kie oni trovas altan radioaktivecon. Tion oni komencis en Serbio. Sed ne en suda Irako - fortaj ventoj blovas la polvon ...

Jen la dokumenta filmo de 2015 en Jutube. Kelkaj kuracistoj kaj esploristoj raportas pri iliaj trovaĵoj - tiu filmo estas en la germa lingvo:

<https://www.youtube.com/watch?v=kLuR8UGco6k>

Jen dokumento el Irako - aparte pri la mortado kaj misformigo je infanoj:

<https://www.daserste.de/information/politik-weltgeschehen/weltspiegel/sendung/swr/2013/irak-uranmunition-100.html>

Kaj jen pri la aktuala uzado en la defendo-milito de Ukraino kontraŭ Rusio.

<https://deutsche-wirtschafts-nachrichten.de/702795/Grossbritannien-liefert-Uran-Munition-an-Ukraine>

Jen informoj en la angla:

https://en.wikipedia.org/wiki/Depleted_uranium

Bedaŭrinde vikipedio en Esperanto ne mencias tion:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Iraka_milito

= =

2023-10-11 Donana Nacia Parko en suda Hispanio savita !?

Dank' al 120.000 subskriboj la regionala registaro de Andaluzio retiris planitan leĝon. Kaj ankaŭ la EU-Komisaro pri Naturaj Medioj, Sinkevičius, konfirmis sian agadon por tiu regiono. Pluraj ekologiaj NRO-oj protestis ĉar tiu leĝo permesintus preni eĉ pli da akvo el tiu marĉa regiono, kiu jam nun havas problemojn, ĉar kamparanoj (pri fragoj) ne-leĝe prenas akvon de tiu regiono.

Tiu nacia parko prezentas tre varian biosferon (200 specioj da migro-birdoj, endema linko, ...). Legu pli pri tio en la retejo de WeMove (ni movas).

Jen la retejo pri ĉi-tiu agado en 7 diversaj lingvoj. La kolekto de subskriboj finiĝis (supozeble):

<https://action.wemove.eu/sign/2023-05-save-donana-petition-EN>

kaj jen pri en Vikipedio pri Donjana Nacia Parko - en aliaj lingvoj pli detale:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Do%C3%B1ana>

- - -

2023-10-08 - 11-03 ekologia influo de predantaj bestoj

Simile kiel en Usono, oni nun klopodas re-naturaligi la naturparkon Gorongosa en Mozambiko. Tie okazis milito, kiu kaŭzis mortigon de multaj bestoj. Poste kelkaj plantomanĝantoj rapide evoluis, sed la predantoj kiuj ĉasas la aliajn mankis. Tiu malbona ekvilibro iĝis kaŭzo fari eksperimenton:

sen predantoj kelkaj cervo-similaj bestoj perdis la timon, kaj paŝtis ankaŭ en ne-protektodonaj terenoj, do en la savano, kaj ne plu kaŝis sin inter la arboj. Simile ili monitoris inter araneoj kaj insektoj kiujn tiuj kaptas. Fakte la timo pro predantoj montras la paŝtatojn ilian naturan lokon en la tereno. Tiam la herboj en la savano kreskas pli bone, kaj taŭgas por kaŝi sin.

Dokumenta filmo, 51 minutoj, en la franca kaj germana:

<https://www.arte.tv/de/videos/098386-000-A/ueberleben-in-der-wildnis/>

Vidu ankau la artikolon je la 6a de Majo 2023.

= =

2023 Klimato sur la Krimeo - vojaĝi en iama okcidenta Sovetio:

en la angla, franca kaj germana lingvoj - ankaŭ pri vojaĝoj, kaj historio

<https://www.dreizackreisen.de/klima-krim-ukraine>

- - -

2023 - 2050 Klimatovariigo kun diversaj sekvoj en Tuvalu kaj en Thule

Do, en Grenlando la maldikiigo de la glacio-tavolo malhelpas la ĉasistojn (homoj kaj blankaj ursoj, ktp).

Aliflanke en la suda Pacifiko, la ebenaj insuloj de Tuvalu estas pli ofte inunditaj; la sala akvo detruas la plantojn, baldaŭ tie ne plu eblas vivi.

Jen la dokumenta filmo pri tiuj du ekstremaj lokoj - en la germana - eblas vidi „trailer“ koncizega formo de tiu filmo:

<http://barnsteinerfilm.org/thuletuvalu/thuletuvalu-der-film/>

Jen plia materialo, kaj la „trailer“ (2 min) ankaŭ en la angla:

<https://filmsfortheearth.org/filme/thuletuvalu/>

kaj jen en formo de tekstoj por diskuti kun lernantoj

http://barnsteinerfilm.org/wp-content/uploads/Thule-Tuvalu_KC_2015-08-11-_final.pdf

Jen informoj en la germana vikipedio, ankaŭ havebla en Cymraeg (kimra lingvo ?):

<https://de.wikipedia.org/wiki/ThuleTuvalu>

Kaj en Esperanto:

Klimata-varmigo-varmfrapo-ce-la-supraĵo-de-la-oceanoj-estas-prokrasta-bombo.html

<http://neniammilitointerni.over-blog.com/2023/09/sud-koreio-la-ekologiistaj-asocioj-manifestacias-por-postuli-forlason-de-la-fosiliaj-energioj.html>

- - -

2023-10 Fiŝistoj de Norda Koreio minacas la biosferon

Dokumenta filmo (25 min, ĝis Junio 2026, en 6 lingvoj)

Evidente miloj da lignaj fiŝistaj boatoj el norda Koreio fiŝkaptas ne nur kie ili rajtas, sed ankaŭ en la regiono norde de Vladivostok, laŭlonge de la rusia bordo, kaj ankaŭ sur la maro.

Iliaj metodoj ne respektas la biosferon de la maro; iliaj retoj kaptas ĉion; se tiuj estas difektaj oni lasas ilin en la maro, kaj tie ili minacas aliajn marestulojn kaj ankaŭ plonĝistojn.

Rusiaj fiŝistoj el Vladivostok raportas, ke ĉiam malpli da grandaj fiŝoj, kaj ankaŭ kankroj k.s. kiuj loĝas je la grundo de la maro estas forkaptitaj totale.

Tiuj produktoj gravas por la militistaro de N.K.; kaj granda parto estas vendata en Dandong al ĉinoj.

<https://www.arte.tv/de/videos/096007-000-A/rusland-die-raubfischer-aus-nordkorea/>

- - -

2023-09 Arnika montana k.a. - sanigaj plantoj el la Vogezoj

Tiu dokumenta filmo (en la franca kaj germana, 53 min., videbla nur ĝis 3a de Oktobro) montras ankaŭ pluraj lokoj en la Vogezoj, kaj la homojn kiuj prilaboras tiujn plantojn.

Kreskas sur herbejoj kies grundo ne estas tre fekunda. El la floroj oni produktas diversajn kuracilojn por muskolo, haematomo kaj inflamiĝo. Tiu kamparano de la *La Ferme du Bien-être* studis etnobotaniko, kaj rakontas pri la burokrataj problemoj. En antaŭaj tempoj ili rajtis rakonti por kiu malsano iu saniga planto bone taŭgas; sed nuntempe ili ne plu rajtas informi

pri tiaj detaloj; ĉar kuracado pere de plantoj estas malpermesata en Francio - ili ja ne studis medicinon.

En la Botanika Ĝardeno de Strasburgo oni plantas multajn el tiuj sanigaj plantoj (6000).

Tre interese ankaŭ la temo ke la pliforta fekundigo de la montaraj herbejoj por nutri pli da bovinoj, kaŭzas la formorton de tiaj plantoj. Intertempe estas leĝo ke oni rajtas tro-fekundigi tiajn herbejon. La franca filio de Weleda prilaboras per-mane arnikon frumatene freŝ-plukita (la tuta planto super la grundo). Ili rakontas pri fitoterapio, diversaj manieroj produkti sanigajn unguentojn aŭ tinkturojn.

<https://www.arte.tv/de/videos/078702-019-A/geo-reportage/>

- -

2023-09-20 pri glifosat - Prof. Dr. Peter Clausing, PAN.org

3 tumoroj trovita ĉe musoj: renoj, sango-vazoj, limfo-glandoj.

<https://www.youtube.com/watch?v=iHU9AeHYIFc>

= =

2023-09-20 Peticio kontraŭ daŭra uzado de Glifosat / RoundUp en EU-landoj

Ĝis la fino de 2023 en la landoj de EU validas la aktuala permeso utiligi Glifosat-on. Tial la Europa Parlamento kaj la komisiono devas decidi ĉu finfine aboli la permeson.

1. ĝi damaĝas kaj mortigas multajn el la vivantaro en la grundo, tio signifas malpli forta biodiverseco
2. ĝi ebligas la gigantajn monokulturajn kampojn - kiuj same minacas la vivantaron super la grundo (insektoj kaj birdoj)
3. ĝi ebligas la uzadon de GMO (genteknike modifitaj organismoj) - denove reduktas biodiversecon
4. kamparanoj kiuj uzas glifosaton riskas malsaniĝi je NHL kaj AML (vidu la informojn pri Glyphosat en wikipedia.org - tiu en Esperanto estas tro konciza).
5. la aldonita kemiaĵo (por la "formuligo") pligrandigas la riskojn.
6. Glifosato eniras en la grundakvon, kaj pere de greno ankaŭ en bieron, ktp.

Jen informoj en 8 lingvoj: de, dk, en, es, fr, it, nl, sl

<https://act.greens-efa.eu/de/glyphosat>

Jen pliaj detaloj kun font-indikoj en 3 lingvoj:

(en la angla:) https://www.greens-efa.eu/files/assets/docs/pesticides_factsheet_final_web_references.pdf

(en la germana:) <https://extranet.greens-efa.eu/public/media/file/1/8345>

(en la franca:) <https://extranet.greens-efa.eu/public/media/file/1/8387>

- -

2023-07 Agrokulturo en Ugando - modelo de agroforstado

Agadi kontraŭ la sekeco. Miksi komposton en la grundon altigas la tenivo je akvo (la kapablo reteni akvon). Kibirige Memorial School (lernejo kiu kunlaboras kun t.n. „Slow Food“ movado (tio signifas: malrapide rilate nutraĵo) uzas tradiciajn metodojn de agrikulturo en sia lerneja ĝardeno. La lernantoj lernas organikan agrikulturon. Edward Mukiibi estis instigita kiel lernanto mem planti legomojn tie, por plibonigi la tagmanĝon en la lernejo.

Tio ankaŭ signifas uzi tradiciajn receptojn, ekzemple nuksa-saŭco k.s., anstataŭ importi nutraĵojn. La kultivado okazas en 3 niveloj: avokado-arbo, arbustoj de kafo aŭ banano, kaj je la grundo diversaj legomoj kiel manioko, aŭ faboj.

Ili eĉ konvinkis la prezidenton Yoweri Museveni, rezigni pri gentekniko kaj monokulturoj. La malgrandaj bienetoj nutras la grundon per komposto kaj sterko de kokinoj aŭ kaproj, adicie kun ligna cindro. Kokinoj manĝas insektojn, kaj haketas la grundon. Por protekti la plantojn kontraŭ vorantaj insektoj ili uzas biologiajn rimedojn (kutime el specialaj plantoj).

Artikolo de Simone Schlindwein en Publik Forum, 21a de Julio 2023/14, p. 20 - 23

Komento AVE/mw: La arboj kaj arbustoj protektas la grundon kontraŭ tre forta surradioj, krome kontraŭ fortaj pluvoj, kaj finfine iliaj folioj nutras la vivantaron en la grundo. En kazo de akacioj ili kolektas nitrogenon el la aero pere de mikroboj kiuj kunvivas kun iliaj radikoj.

= =

2023-09-12 Neo-nikotinoidoj - mortigenzoj kontraŭ la naturo

En la 70-aj jaroj oni komencis en Usono batali kontraŭ insektoj pere de DDT - birdoj mortis, ĉar ili manĝis venenigitajn insektojn. Tiam oni malpermesis DDT por agrikulturo. Poste la kemia industrio evoluis aliajn pesticidojn.

Jen filmo de 2016, en daŭro de 56 minutoj, en la germana kaj franca kiu montras la biologian metodon redukti malafablajn insektojn.

<https://www.arte.tv/de/videos/056813-000-A/insekten-die-besseren-schaedlingsbekaempfer/>

Se vi volas scii pri la aktuala temo neonikotinoidoj, vi devas rigardi jenan dokumentan filmon el la jaro 2021 en 6 lingvoj - daŭro 93 minutoj: de, en, es, fr, it, pl.

japana sciencisto inventis Imidacloprid, la unua el la grupo da neonikotinoidoj.

Ĝi estas 100-foje pli efika ol antaŭaj pesticidoj - do, mirinde bona. Pro tio oni evoluis pliajn: Clothianidin, Thiamethoxam, Acetamiprid. Ili estas aplikataj en tre diversaj kampoj. Sed ili ankaŭ damaĝas birdojn kaj ekzemple ranojn.

Lago en Japanio montris moron de fiŝoj - esploristoj trovis ke ili estis viktimoj de Imidacloprid. post la apliko al rizo-kampoj, akvo el tiuj kampoj fluis en la lagon.

Fakte tiuj bestoj ne estis mortigitaj rekte, sed ilia nutraĵo, kvazaŭ akvo-insektoj malaperis. La biologoj kaptis ĉiam malpli da insektoj - familio de ne-vertebruloj.

Monokulturoj estas plej bona loko por insektoj, tio kaŭzas la uzadon de pesticidoj; en grundo de tiaj kampoj mankas multaj insektoj kiuj produktas humuson - la plej bona bazo por plantoj.

Fonduso pri organika agrikulturo - sen pesticidoj - estas kvazaŭ asekuro kontraŭ damaĝoj pro tro multaj insektoj. Ili konsilas la kamparanojn kiel kultivi reduktante la riskon pro insektoj.

La filmo montras kiel abeloj mortas - kvazaŭ en kramfo - kiam ili englutis iomete da tiu pesticido; ili forgesas kion ili nature scias.

La kemia industrio defendas sian merkaton kaj diskutas pri diversaj kaŭzoj kial abeloj malbonfartas. Agnoskologio - estas tiu scienco kiu forŝovas la simplajn argumentojn. La industrio, ekzemple Bayer batalas kontraŭ esploristo kiu esploras pri la malbonaj efikoj de tiaj pesticidoj, kaj malfamigas lin.

Ankaŭ en EU la firmaoj manipulas (ne rakontas ĉion kion ili scias) la rezultojn; bedaŭrinde EFSA ne mem esploras sed nur uzas la informojn de la firmaoj.

Kiam la parlamento sukcesas malpermesigi la plej danĝeran pesticidon, la firmaoj evoluas variantojn kiu unue ricevas permeson - por multaj jaroj, ekzemple Sulfoxaflor kaj Flupyradifuron

Granda problemo estas ke en la grundo intertempe troviĝas pluraj (ĝis 30) diversaj pesticidoj, kiuj agas kune.

Neonikotinoidoj estas „endokrinaj disruptoroj“ - ili influas la nervan sistemon kaj cerbon - jam de beboj.

ACSH - en Usono - estas subtenata de kemiaj konzernoj (ekzemple de Monsanto).

<https://www.arte.tv/fr/videos/098073-000-A/insecticide-comment-l-agrochimie-a-tue-les-insectes/>

Eric Andrieu, MEP de socialistoj, respondeculo de la parlamenta komisiono pri pesticidoj, rakontas pri la longa batalo kontraŭ BAYER, kiu influas la komisionon

<https://www.arte.tv/de/videos/098073-000-A/insektenkiller-wie-chemie-riesen-unser-oekosystem-zerstoeren/>

- - -

2023-09-10 Daurigebla kreskado de urboj

Jen 6 dokumentoj pri tiu temo, videblaj en 6 lingvoj (de, en, es, fr, it, pl) ĝis 2023-11-13

Montras multajn realajn solvojn el diversaj landoj, ekzemple pli densan konstruadon sen krei streĉon.

<https://www.arte.tv/de/videos/084704-001-A/drunter-und-drueber-1-6/>

ĝis

<https://www.arte.tv/de/videos/084704-004-A/drunter-und-drueber-wie-staedte-nachhaltig-wachsen-koennen-4-6/>

- -

2023-09-19 Ekzemploj purigi la aeron de CO2

Jen dokumento (videbla ĝis la 19a de Septembro, daŭro: 50 min) pri la problemo:

(1.000.000.000 Gigatunoj da CO2) el fosiliaj fontoj troviĝas en la atmosfero, kaj devus esti elprenata.

Ekzemploj:

mineraloj kiuj absorbas CO2: bazalto, aparte kiam CO2 troviĝas en akvo.

Climeworks produktas Methanol aus Luft

Heligi nubojn por ke ili povas reflekti la sunlumon (albedo). Ekzemple en regiono super koraloj, por ke tie la maro reduktiĝas la temperaturon. Aerosoloj de vulkanoj havas similan efikon. Tamen eĉ se tio eblas, necesas konsideri kromefikojn.

Planti milionojn da arboj; signifas konkurenci kun paŝtoterenoj.

Komposti planto-defalaĵojn signifas eviti la kreadon de metano - kiu estas eĉ pli forta forceja efiko.

<https://www.arte.tv/de/videos/098424-000-A/erderwaermung-stoppen-aber-wie/>

= = =

2023-04 Rusio minacas - Hiroshimo kaj la sekvoj - ampleksa broŝuro

ĉar la rusa prezidento minacas ankaŭ - per vortoj kaj okcidenten transporto de armiloj - uzi atomarmilojn por sukcesi en sia milito kontraŭ Ukrainio, jen kelkaj informoj pri la okazintaj testoj. Vi certe scias ke en nia literaturo ekzistas pluraj raportoj, inkluzive de la bildstrio "Nudpieda Gen" pri la amasa mortigo pere de la 2 atombomboj de Usono al Hiroshimo (U 235) kaj Nagasaki (Pt 239) en August 1945, kie mortis pli ol 140.000 kaj 74.000, respektive; krome estis vunditaj en ambaŭ urbo po 80.000 (ĉirkaŭaj nombroj).

Tute nova raporto de 2022 mortinta Hibakuŝo (postvivanto de la atombomba eksplodo) Tetsushi YONEZAWA en la angla, Esperanto kaj japana lingvoj kune kun pluraj fotoj, pentraĵoj (ege korŝiraj), mapo kaj tabelo (faktoj pri ambaŭ bomboj) rakontas ĉefe pri liaj propraj spertoj en Hiroshimo. Ĉar li volas ke la homaro ne plu spertu similan amasmortigan teruraĵon, li ankaŭ raportas pri la klopodoj finfine aboli atombombojn, kaj ankaŭ argumentas kontraŭ la uzado de atomenergio.

Eldonita en Aprilo 2023, de la Japan German Peace Forum, Osaka, <nddj.ffmpeg1985@gmail.com>

Koran dankon al HASHIGUCHI Sigeyuki, kiu sendis ĉi-tiun valoran raporton kun grava mesaĝo

2023-09-07 Atombombaj-testoj - tutmonda raporto de IPPNW

Jen detala raporto (en la germana) pri la sekvoj de ĉiuj atombombaj testoj. En la retejoj de internaciaj NROoj vi trovos plurajn informojn, inkluzive prezentaĵon de la evoluo, ek de testoj, ĝis la malpermeso en 1996, kaj pliaj testoj de novaj atombombaj ŝtatoj.

https://www.ippnw.de/commonFiles/pdfs/Atomwaffen/lppnw_Report_Atomwaffentests.pdf

Jen diversaj mapoj kaj informoj en la angla:

https://www.icanw.org/nuclear_tests

https://www.icanw.org/nuclear_weapons_history

<https://www.nucleartestimpacts.org/>

<https://www.armscontrol.org/factsheets/nucleartesttally>

- - -

2023-09 / 2024-06 Ĉio pri glaĉeroj , maroj, ventoj:

3 Klarigaj dokumentadoj (ĉ. 25 min, en la franca kaj germana) pri la aktuala situacio pri glaĉeroj, maroj kaj ventoj de nia Tero:

Unue pri la glaĉeroj:

1. Pri la estiĝo de glaĉeroj (antaŭ 56 milionoj da jaroj) en la ritmo de la sezonoj.
2. Pri ilia malrapida moviĝo.
3. Kiam malpura aero transportas malhelan materialon (ekzemple fulgon) sur la glaĉeron, la albedo (re-brilo) reduktiĝas, kaj la varmo de la suno povas degeli la glacieron.
4. Se kreiĝas fendoj, kaj tie envenas degelita akvo, tiu akvo enfluas en la fendojn kaj tie sub la glaĉero funkcias kiel transportilo - fakte la rapideco de glaĉero altiĝas.
5. Se ĉiuj glacio-terenoj degelas, plejgrave de Grenlando kaj Antarkto, la akvo-nivelo de la oceanoj altiĝus ĝis 60 m !
6. Kelkaj glaĉero-regionoj nutras grandajn riverojn, ekzemple pli ol 6 riveroj el la Himalaya-montaro: ili nutras en somero la riverojn en la sekaj regionoj de Centra Azio, kaj tiel ebligas la vivon tie.

<https://www.arte.tv/de/videos/109816-007-A/was-wenn-die-gletscher-verschwinden/>

- -

Due pri la altiĝo de la mara nivelo; ĝi ne ĉie okazas en sama rapideco. La mezurado okazas plej bone el satelito, kiu mezumas la diversajn altiĝojn. Dum la lastaj 100 jaroj la mara nivelo altiĝis je 20 cm. Kroma efekto estas la varmiĝo de la marakvo. Tiu altiĝo plirapidiĝas. Tial necesas antaŭzorgi por la sekvaj 40, 60, 70 jaroj.

Kipp-Punkte (kiam oni ekas t.n. Domino-Efekton) signifas ke iu ŝanĝiĝo ek de iu temperaturo (aŭ alia parametro) ne plu estas haltigebla. Ekzemple la degelo de la glacio de Grenlando. Samtempe okazas inversa efiko, se tereno kie antaŭe estis dika tavolo da glacio, post la degelo tiuj regionoj aliĝas malrapide (simile kiel dikiĝas spongo de kiu oni forprenas pezan ŝtonon).

Homa agado zorgas en Luisiana (New Orleans) al malaltiĝo de la tereno.

Naturaj metodoj, mangrovoj aŭ maraj gresoj, helpas bremsi la forton de ondoj; samtempe ili donas protekton al fiŝidoj.

<https://www.arte.tv/de/videos/109817-001-A/versinken-wir-im-meer/>

- -

Trie pri la ventoj: Pro la altiĝo de la tutmonda temperaturo ŝanĝiĝas la rapidecoj de ventoj.

Tiam la vento iĝas malpli rapida. Kun grandaj efikoj al pluvo, alternativaj energioj, naturo, ... Arboj kreskas pli alte, kaj tial pli bremsas la venton.

Aliflanke oni spertas ke uraganoj iĝas pli grandaj kun pli altaj rapidecoj; kaj ili malpli rapide moviĝas.

Datumoj pri la vento-rapideco ekzistas nur el la 1960aj jaroj. Pli longe kaj pli precize oni mezuris la aer-premon.

Interese esta la t.n. papilia efekto. La prognozo pri la vento-rapideco estas limigita al 1 aŭ 2 semajnoj.

Jet-stream en la nord-polusa regiono dum vintro estas pli rapida kaj malpli kurba. Sed en somero ĝi estas malpli rapida, kaj tiel okazas longaj vetero-periodoj.

<https://www.arte.tv/de/videos/109817-002-A/weht-bald-ein-anderer-wind/>

= =

2023-08 peticio kontraŭ Glifosato

Eble vi jam subskribis ĉi-tiun peticion, ke EU ne plu pli-longigu la akcepton de Glifosato ?

Se ne, bonvolu fari nun. En tiu retejo vi povas elekti inter 6 diversaj lingvoj: de, en, fr, it, nl, pl

<https://act.wemove.eu/campaigns/glyphosat-verbot-jetzt>

- - -

2023-08-22 Rusa milito kontraŭ Ukraino dum 18 monatoj

En Januaro de 1997 Rusio kaj NATO jurŝtate kontraktis intenco-deklaron pri reciproka sekureco.

Eĉ post la malakceptita akaparo de Krimeo okazis interparoloj de la aparte kreita NATO-Ruslanda Konsilio. La lasta en Januaro 2022, 1 monato antaŭ la komenco de la milito de Rusio kontraŭ Ukraino.

La tiamaj postuloj de Rusio estis ne-realaj (laŭ okcidenta kompreno) kaj NATO ne povis obei al ili.

https://www.nato.int/cps/en/natohq/topics_111767.htm

- - -

2023-08-11/19 Rusio malsukcesis sur-lunigi, Hindio sukcesis

2 monatoj post la komenco de la nuna milito ESA decidis fini la kunlaboron kun Roskosmos. La planita sur-luniĝo ne funkciis.

<https://www.tagesschau.de/ausland/europa/russland-mondsonde-luna-100.html>

kelkaj tagoj poste Hindio sukcesis:

<https://www.tagesschau.de/inland/regional/nordrheinwestfalen/wdr-indien-landet-erfolgreich-auf-dem-mond-100.html>

= =

Trovitaĵoj:

2023 - 20230 - 2050 Realeco pri la klimata-varmigol

www.klimata-varmigo-varmfrapo-ce-la-suprajo-de-la-oceanoj-estas-prokrasta-bombo.html

Tie oni trovas multajn informojn - inkluzive pri ekosistemoj:

<https://www.cultura10.com/eo/kategorio/scio/>

- - -

2023-08-20 Avokado - salubra frukto - akvo-rabanto

Certe avokado estas bona frukto

Origine ĝi kreskis en pluvarbaroj; t.s. ke tiu arbo bezonas multe da akvo.

Pro la nuntempe granda deziro je avokadoj firmaoj kultivas ĝin ankaŭ en pli sekaj landoj, ekzemple en Portugalio - dum 2022 tie oni rikoltis 13.000 tunoj. La dokumento montras ke tiu lando ne sufiĉe kontrolas kiom da akvo estas bezonata por tiu kulturo. Adicie venas la ĝeneralaj problemoj de monokulturoj: apliko de pesticidoj kiuj poste aperas en la , tro multe da nitrato en la grundakvo.

Tiu video ankaŭ montras alternativon: agro-forestado, kiu pli bone protektas la grundon, kaj reduktas la bezonon da akvo, krome la grundo estas nutrata ankaŭ de la arbofolioj.

Jen informa video en 6 lingvoj, videbla tie ĝis Oktobro:

<https://www.arte.tv/de/videos/100300-049-A/re-durstige-avocados/>

- - -

2023-09-06 Protekti la naturon - principo arkeo -

Informo pri la saigao-antilopo en la stepo de Kasaĥio kaj Uzbekio, kiu tre bone estas adaptita al ĉi tia malfacila tereno.

Dum Sovetio oni mortpafis ilin milionskale, por havi viandon kaj ne konkurencon por la kreado de nova agrikulturo, legebla i.a. en la romano de Ĝingiz Aitmatov: „Плаха“ (1986) en la germana „der Richtplatz“

Simile nekonata la problemoj de rampuloj, kies maldika haŭto estas atakita de iu bakterio, kaj pro tio oni ne tuŝu ilin per la mano.

La Kurtbuŝa rinocero en Namibio estis preskaŭ ekstermita, ĉar la korno estis ege ŝatata pro superstiĉa uzado kiel medicino.

<https://citizen-conservation.org> - bredas endanĝeritajn speciojn , plejparte rampulojn.

Tiu video en la franca kaj germana (44 min) estas videbla ĝis la 7a de Septembro:

<https://www.arte.tv/de/videos/100952-001-A/mission-wildnis/>

= =

2023-08 Francio - protestoj kontraŭ trouzado de akvo finfine sukcesis

Marie-Therese sendis la sekvan mesaĝon de

<https://www.agirpourenvironnement.org/>

[VICTOIRE] Soulèvements de la Terre : Le Conseil d'Etat dissout la dissolution

ĉar mi ne komprenis, ŝi sendis jenan koncizan informon:

Temas pri movado kiu organizas agojn kontraŭ ekologie malpravaj , neutilaj, aŭ/kaj dangxeraj projektoj, ekzemple la konstruo de grandegaj akvorezervujoj ("mégabassines") en departementoj Deux-Sèvres kaj Charente-Maritime, kiuj fakte favorus la intenskultivistojn.

Okaze de multnombra manifestacio lastan marton en Sainte Soline (Deux-Sèvres), la polico tre perforte pritraktis multajn partoprenantojn, dum kvazaŭa militbatalo; multaj el ili, kaj ankaŭ policistoj estis vunditaj, sed la ministro Darmanin , kiu difinas sendistinge manifestantojn kiel "ekoteroristojn", decidis malekzistigi tiun movadon.

Pluraj asocioj kaj movadoj protestis, kaj bonsxance, la Sxtata Konsilio nuligis tiun decidon - eble provizore, sed gravas tiu tre bonvena kontraŭfrapo al tiu vere nociva ministro. Laŭdire, cxar li ne sukcesis anstataŭi la cxefministrinon E. Born, li kolerante kontraŭ Macron nun sciigas ke li jam kandidatigxas kiel estonta prezidento en 2025...

- - -

2023-08 Preparado al malbona situacio

32 minuta raporto (en 6 lingvoj) kiamaniere Svedio sin preparas al ekologia aŭ milita problemoj.

Homoj lernas konduti, kaj prepari. La sveda insulo Gotland proksimas al Kaliningrado, kaj jam plurfoje estis vizitata de rusiaj militistoj.

<https://www.arte.tv/de/videos/107194-049-A/re-schweden-preppt/>

- - -

2023-08 Konciza informo pri GMO

Dum 3:20 minutoj la video klarigas kial ankaŭ la plej moderna GMO-tekniko, CRISPR/CAS, necesas intensan kontrolon antaŭ ol oni uzas tiamaniere kreitajn speciojn. IFOAM, la internacia organizaĵo pri organika agrikulturistoj, preferas organikan bredadon, kiu ankaŭ evitas ke kamparanoj estas dependaj de grandaj konzernoj. La cideo estas en la angla, eblas tradukon en la germana:

<https://www.youtube.com/watch?v=dSjGXqOJk1Y>

- -

2023-08-15 Agroforstado

Dieser Sommer hat es in sich: Hitze, Waldbrände, Dürren in ganz Europa. Der Klimawandel ist da – wie kann man die Folgen abmildern? Immer mehr Bauern sehen in der Agroforstwirtschaft eine Lösung: Baumreihen auf Feldern, in deren Schatten Getreide und Tiere besser gedeihen, der Boden vor Austrocknung und Erosion geschützt ist, Kohlenstoff gebunden wird und Artenvielfalt entsteht. Bonvolu legi pli pri tio sur la retejo de Arte.tv: La dokumenta filmo en la franca aŭ la germana daŭras 32 minutoj:

<https://www.arte.tv/de/videos/104430-003-A/re-mit-baeumen-gegen-die-duerre/>

= =

26-a de Julio estas la Tago de Mangrovoj & de Esperanto

Jen dokumenta filmo pri Irrawaddy en Myanmar/Birmo en la franca kaj germana pri la valoro de mangrovoj, videbla nur ĝis 26a de Julio !

<https://www.arte.tv/de/videos/069763-003-F/deltas-der-welt/>

Ankaŭ en Irako iu replantas mangrovojn, ĉar tiu lando havas problemon pri enfluo da salakvo en la subgrundon.

- - -

2023-07-22 Trofiŝado en suda Pacifiko mortigas milojn da aliaj bestoj

2000 mortaj penguoj albordiĝis je Urugvayo, same aliaj birdoj kaj mar-bestoj.

Esploristoj diras ke la trofiŝado kaŭzas ke tiuj bestoj ne sufiĉas sufiĉe da nutraĵo, kaj mortas pro manko da energio. jen informo en la germana:

<https://www.tagesschau.de/ausland/amerika/pinguine-uruguay-100.html>

Jen kolekto pri geo-scienco en la germana:

<https://www.planet-wissen.de/natur/meer/atlantik/index.html>

En la angla pluraj videoj pri fiŝoj:

<https://www.planet-wissen.de/natur/meer/atlantik/index.html>

inter ili ankaŭ pri la utilo de arboj (mangrovoj):

<https://www.planet-wissen.de/natur/meer/atlantik/index.html>

= =

2023-06-12 Kasaĥio pri Semipalatinsk & brulantaj arbaroj en regiono ĉe Abai

Abai estis fama poeto de Kasaĥio, tial oni ŝanĝis en 1949 la antaŭan nomon de tiama vilaĝo honore al li. Ĉirkaŭ Abai, proksime de Karaganda, brulas arbaroj je areo de 60.000 ha.

Intertempe jam 14 fajrobrigadistoj mortis pro tio.

Tial la prezidento Tokajew klarigis la 12an de Junio 2023 al funebra tago.

--

Proksime al Abai, en la urbo Semipalatinsk loĝis multaj elstaraj homoj dum la cara epoko. La kasaĥa senato akceptis leĝon pri la resanigo de la regiono Semipalatinsk kie Sovetunio elprovis siajn atombombojn. Pro la tutmondaj protestoj kontraŭ atombombo-testoj - Nevada-Semipalatinsk - prezidento Nursultan Nasarbajew decidis fermi la terenon je 18.000 km². Inter 1949 kaj 1989 oni eksplodigis 496 atombombojn. Ĝis la jaro 1962 okazis tiaj eksplodoj en la aero aŭ sur la surfaco. Tial en la tuta regiono, kaj fakte en la tuta mondo pluvis radioaktivaj substancoj. Ĉar ankaŭ la surfaco estas radioaktiva en tiu regiono ankaŭ nuntempe multaj infanoj havas damaĝojn, estas korpe kaj mense handikaptiaj; relative multaj homoj - pli ol laŭ tutmonda statistiko - sinmortigas tie.

En la Kunstkamera de la Medicina Universitato en Almaty troviĝas „Kunstkamera“ (muzeo) en kiu oni vidas diversajn misformitajn fetojn pro la amasa eligo de radioaktivaj materialoj tie. Post la UK en Pekino, 2004, mi estis tie - sed je maltaŭga tempo.

Pli da detaloj en Vikipedio, en Esperanto nur tre koncize.

Jen konciza informo pri ambaŭ temoj en la germana:

<https://www.laender-analysen.de/chronik/?c=kasachstan&d1=2023-05-25&d2=2023-07-04>

2023-07 Montenegro: ekologiaj sekvoj de la ĉina aŭtoŝoseo

jen dokumenta filmo pri kelkaj detaloj. Evidente oni deponis la ŝton-amasojn el la konstruitaj tuneloj simple laŭlonge de la rivero Tara. Laŭlonge de multaj kilometroj tiu rivero ŝanĝis al malbona direkto sian biosferon. Pro la detruo de la grundo de la rivero multe da akvo perdiĝas en la subgrundon. ne plu estas lokoj tie kie junaj fiŝidoj povus vivi., k.t.p.

Pri la ekonomia akaparo flanke de Ĉinio mi jam skribis; sed tie estas pli aktualaj informoj.

Ĉar Montenegro ne povas pagi la financajn kostojn, laŭ la kontrakto Ĉinio povas alpreni al si aliajn infrastruktur-objektojn.

Ĉinio alportis milojn da laboristoj - simile kiel en ĉiuj ĉinaj infrastruktur-objektoj en Afriko.

La video, 33 minutoj, estas videbla ĝis Oktobro, en la franca kaj germana, kaj ankaŭ subtitolita en la angla - tiam vi ankaŭ auskultas la lokajn homojn en iliaj lingvoj.

<https://www.arte.tv/de/videos/104426-005-A/re-prestigeprojekt-autobahn/>

= =

2023-07-28 La homaro sur Tero averaĝe foruzis, kion validus dum tuta jaro.

Jen koncize en Esperanto - de tie vi povas trovi detalajn informojn en via lingvo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Tero_Ekscesa_Tago

Dependas de lando kiam okazis tiu tago. Sur jena paĝo oni vidas multajn landojn kun la respektiva dato de ĉi tiu tago:

ekz-e Qatar kaj Luksemburgo jam en Februaro,

Germanio, Francio Japanio jam komence de Majo,

Ĉinio, Turkio en Junio,

sudamerikaj landoj en Aŭgusto (ili havas malaltan densecon da homoj),

Jamajko fine de Decembro - do, estus modela lando.

<https://www.umweltbundesamt.de/themen/erdueberlastungstag-ressourcen-fuer-2022-verbraucht>

2023-07-11 EU parlamentanoj batalas por **EU Nature Restoration Law**

koalicio de Verduloj, Socialistoj kaj Soci-Demokratoj (S&D) sukcesis proponi EU-leĝon kiu

protektos 10% de la uzata areo por pli natura agrikulturo. Do, sen la plej danĝeraj pesticidoj k.s., reaktivu marĉojn.

Jutta Paulus (Verduloj/Libera alianco, ÖDP) kaj Delara Burkhardt (S&D), ambaŭ membroj en la medio-komitato informis pri la kontraŭstaranta frakcio (t.n. konservativaj, EVP) kiu metas falsajn argumentojn por malebligi ĝi tiun proponon. Interesa informo estis ke parlamentanoj de EVP kiuj favoras ĝi tiun leĝon, estis premitaj ne subteni ĝin.

Organika agrikulturo subtenas biodiversecon, protektas la humuson, ankaŭ la vivantaĵon en la grundo - tiel ankaŭ stokas CO2 en la grundon.

Jen en retejo de la Verda frakcio de la EP (en 11 lingvoj):

<https://act.greens-efa.eu/de/ohne-natur-keine-nahrung>

La asocio de organikaj kamparanoj favoras ĉi-tiun proponon - jen en la angla:

<https://www.organicseurope.bio/news/farmers-want-nature-restoration/>

- - -

2023-07-08 Evoluoj je diversaj rapidecoj

Esploristoj trovis ke je kelkaj specoj la evoluo okazas tre rapide, parte pro la klimata ŝanĝo. Tio signifas ke ilia genetiko jam prezentis diversajn manierojn reagi al la naturo; sed ebla konsekvenco estas ke ilia ebleco adaptiĝi al estontaj ŝanĝoj reduktiĝas. Tio estas danĝero. Jen la franca kaj germana, dum 25 minutoj, videbla ĝis Julio 2024:

<https://www.arte.tv/de/videos/109816-004-A/stehen-wir-vor-einer-turbo-evolution/>

= =

2023-06-16 Peticio por malhelpi barlagon en Indonezio

2017 sciencistoj eksciis ke la Orang-Utan simio en Tapanuli (*Pongo tapanuliensis*) estas aparta specio (dividiĝis antaŭ 670.000 jaroj). Aparte gravas, ke ĉi-tiu specio estas la plej rara inter la Orang-Utan-oj.

Ĉina firmao volas konstrui grandan barlagon por produkti kurenton, sed tiu projekto detruus grandan parton de ilia viv-tereno, kaj krome rezultus 2 malgrandaj teritorioj, kio signifas ke tiel ili ne povas daŭre ekzisti.

Jen la peto de NGO kiu rilatas al la pluv-arbaroj - vi povas elekti el pluraj lingvoj, inkluzive bahasa indonezia - al:

Präsident von China Mr. Xi Jinping,

Präsident von Indonesien Mr. Joko Widodo,

CEOs von Sinohydro, CEOs der staatlichen Elektrizitätswerke PLN

<https://www.regenwald.org/petitionen/1139/tapanuli-orang-utan-schuetzen-kein-staudamm-in-batang-toru>

= =

2023-06-06 Rusio detruis la muron de barlago Kaĥovska

Laŭ multaj logikoj oni povas supozi ke la rusaj okupantoj tie krevigis la muron. La Kremlo kulpigas Ukrainon - sed ili tro ofte mensogas por kredi ilin. Jen kelkaj ligiloj:

<https://www.mdr.de/nachrichten/welt/osteuropa/politik/ukraine-krieg-kachowka-staudamm-landwirtschaft-getreide-museen-100.html>

<https://www.bbc.com/news/world-europe-65818705>

- -

2023-06-07 Aral-marĉo konciza rakonto kun multaj desegnoj kaj mapoj

Sovetunio decidis uzi la akvon de Amu Darya por kampoj de kotono kaj rizo, trionon de la

akvo-kvanto nutras la Karakum-kanalon tra Turkmenio. Nur la norda parto - en Kasaĥio - intertempe estis subtenita, kaj barita per digo. Tiamaniere tie denove troviĝas lago (laŭ areo simile al Bodensee / Lago de Konstanco).

Alia problemo estas la barlagoj je Amu Darya en Kirgizio kaj Tadŝikio, kiuj ĉefe uzas la akvoforton por produkti elektron - aparte dum vintro (tiam tiom da akvo ne bezonatas). Mankas kohera agado por saĝa uzo de la akvo-resursoj.

Aral Kum - la salo-dezerto tie kie antaŭe estis la granda parto de la Aral - eligas venenojn, el la insulo Vozrozhdenja. Tie troviĝis sovetia esplor-institutoj pri mortigaj bakteriaj armiloj. Ek de 2001 oni povas atingi tiun iaman insulon piede aŭ veturile.

Informojn vi trovos sur nia retejo: verduloj.org/aral.htm

Paralele en tiu dokumenta filmo oni montras la sorton de la Aral-marĉo kaj klarigas ankaŭ tutmondajn akvo-problemojn (videbla ĝis 2023-12-31).

<https://www.arte.tv/de/videos/073405-001-A/im-lauf-der-zeit/>

- - -

2023-06-07 Peticio - liberigi medio-protektantan advokaton en Vjetnamio

Tiu informo venis de la NRO Internationalrivers.org .

Dang Dinh BACH organizas la movadon kontraŭ uzado de karbo. Li estis malliberigita 5 tagoj post la naskiĝo de lia filo antaŭ unu jaro. Lia edzino petis aktivi por li, ĉar ŝi timas ke li ne finos la malsat-strikon, kaj eble mortos.

Bonvolu legi pli kaj subskribi por reliberigi Dang Dinh BACH - vi povas elekti inter 12 aliaj lingvoj:

https://secure.avaaz.org/campaign/en/stand_with_bach_2023/?kGgALab

= =

2023-06-03 La rivero Odro iĝu jura persono - „Osoba Odra“ - Peticio

Antaŭ 11 monatoj mi raportis ĉi-tie pri mia vizito en Wroclaw, kaj pri la amasa fiŝ-mortado tie pro malmulte da akvo kaj salo el karbominejoj.

Bedaŭrinde la nuna registaro de Pollando ne tre multon faris (aŭ pli bone „ne faris“) por savi la ankoraŭ tre naturan karakteron de la Odro; ili volas uzi ĝin por transporti varojn kaj prefere meti la odron en kanalreton inter la Nigra la Balta Marĉoj. Pluraj naturprotekto-organizaĵoj protestas delonge kontraŭ tiu sen-senca kaj kontraŭ-natura projekto.

Ili nun klopodas helpi al la Odro, ke ĝi estos memstara jura persono; simile kiel la rivero Whanganui en Novzelando (2017) kaj la Mar Menor en Hispanio (2022) - tiel ke „Osoba Odra“ povus esti defendita de komitato de kelkaj natur-mediaj asocioj.

Jen ilia retejo en 3 lingvoj (de, en, kaj pl) - tie troviĝas ankaŭ Peticio, sed ĝi estas nur en la pola. Mi tamen subskribis.

<https://osobaodra.pl/en/home/>

Hodiaŭ la germana ministrino pri medioprotekto, Steffi Lemke (de Verda Partio) petis sian polan koleginon ke la registaro - dum longa sen-pluva tempo (kiel nun denove) - malpermesu la salajn ab-akvojn el polaj karbominejoj (en Silesio) en la Odro, ĉar denove okazus la sama mortado de akva vivantaĵo - en varma sala akvo kreskos t.n. Ora Algo - kies veneno en Julio 2022 mortigis fiŝojn, helikojn kaj konkvojn en la Odro.

(fonto: el radio-elsendo de Deutschlandfunk, kaj artikoloj en taz 2023-06-03, p. 47-49)

- - -

2023-05-10 Reciklado de elektronikaj aparatoj

en la franca kaj germana (32 min):

<https://www.arte.tv/de/videos/107194-075-A/re-schatzsuche-im-schrott/>

Jen 3 novaj firmaoj: Commown (en Francio) - kiuj riparas ne plu modernajn komputilojn, 2ndlifeSolar: (en Hamburg) - uzitajn fotovoltaiko-moduloj, parte en privata uzo, kie la alta kvalito ne tiom gravas, kaj E(co)work: (el Svisio / en Barato) recikligas - sub sanaj kaj bonaj teknikaj kondiĉoj; ĉar ofte ankoraŭ oni simple bruligas la materialon por gajni kupron kaj oron.

= =

2023-05-30 la milito kontraŭ Ukraino mem damaĝas Rusion

tiu milio (jam ekde 2022-02-24) kaŭzis pli ol 300.000 da vivoj je ambaŭ flankoj (pli ol 200mil je la flanko de la agresinto).

La ekflamigo de nafto-barelejoj, bruligo de konstruaĵoj, detruo de domoj kaj diversa infrastrukturo, ktp. eligas gigantajn kvantojn da CO₂, adicie necesos post la milito multe de la t.n. „griza energio“, t.s. ke la re-konstruado postulos multe da nova materialo (instigas denove CO₂ pro ties griza energio).

Aldonis al la klimata varmiĝo (tendence) - tial jam nun (fine de Majo) multloke brulas arbaroj en Kanado, suda Eŭropo kaj en Siberio - tiom frua fajro ĝenas la sovaĝajn bestojn en la arbaroj kaj ankaŭ la homojn.

<https://www.tagesschau.de/wissen/klima/klima-studie-kippunkte-erde-100.html>

Jen de la instituto - en la angla aŭ germana:

<https://www.pik-potsdam.de/en/topics/planetary-boundaries-tipping-elements-global-commons>

Kaj jen ĝenerala rigardo al kromaj efikoj de militaro kaj de milito kontraŭ medio kaj klimato (germane):

<https://www.hintergrund.de/globales/umwelt/krieg-schaedigt-umwelt-und-klima/>

Simile de germana instituto pri politika edukado:

<https://www.bpb.de/themen/kriege-konflikte/dossier-kriege-konflikte/266613/klimawandel-als-risikomultiplikator-und-konflikttreiber/>

Kaj jen la servo-oficejo por vetero-prognozoj (ankaŭ en la angla):

<https://www.bpb.de/themen/kriege-konflikte/dossier-kriege-konflikte/266613/klimawandel-als-risikomultiplikator-und-konflikttreiber/>

https://www.dwd.de/DE/klimaumwelt/klimaforschung/spez_themen/attributionen/node_attribs.html

- - -

2023-05-31 Ĉinio verdigas la dezerton pere de PV (Fotovoltaiko)

En dezerta tereno (Kubuqui) de Interna Mongolio ili konstruigis grandan kampon da PV-instalaĵoj, kiuj sekvas la sunon.

Je la rando ili plantis arbojn (i.a. daktilojn), parte kiuj produktas fruktojn; kaj sub la moduloj oni kreskigis plantojn - samtempe la moduloj donas ombron kiu evitas la sekiĝon de la grundo.

Tiuj plantoj ankaŭ bremsas la venton kaj kolektas sablo-polvon el la aero. Por la komenco necesis akvo, kiun oni pumpas el 500m da profundeco*. Feliĉe tiuj arboj kaj arbustoj mem reduktas la temperaturon kaj kreas pluvon. Ankaŭ la biodiverseco je bestoj altiĝis.

Jen la raporto en la germana:

<https://hans-josef-fell.de/2019/09/10/china-hat-riesige-teile-der-wueste-gobi-wieder-aufgeforstet/>

= = =

2023-05-24 Bremsi luksajn CO2-eligojn - EU-skala peticio

Nur 1% de la homaro kaŭzas 50% de la klimataj eligoj pro aviadila vojaĝado. Unu ebleco estas postuli imposton al la fuelo por aviadiloj. Eblas bari flughavenojn kontraŭ privataj ĵetoj. Jen la peticio en 6 lingvoj: de, en, es, fr, it, pl :

<https://act.wemove.eu/campaigns/luxus-emissionen?action=sign>

- - -

2023-05-18 Peticio pri BPA al germana ministro pri agrikulturo kaj nutrado

La instituto de EU pri nutraĵoj estas EFSA. Ili reduktis la tagan maksimuman dozon (TMD) de 4 mikrogramoj al 0,2 ng BPA (bis-fenol A), redukto je 20.000 oblo. BPA minacas la fekundecon, kaj hormon-sistemon. I.a. ĝi troviĝas en lakitaj ladskatoloj.

Se vi loĝas en Germanio bonvolu subteni la peticion malpermesi BPA por nutraĵo-pakaĵoj al la germana ministro pri nutrado (ktp.) Cem Oezdemir:

<https://www.foodwatch.org/de/mitmachen/hormongift-alarm-schluss-mit-bpa-in-konserven>

Sed certe tiu temo gravas ankaŭ por aliaj landoj - videbla ekzemplo per de ĉi-tiu filmo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Plasta_planedo

- -

2023-05-18 Bonaj novaĵoj el Brazilo - malarbarigo reduktiĝis

Kompare inter Aprilo 2023 kun tiu de 2022 oni rimarkis redukton de senarbarigo je 68%; dank' al prezidento Lula. Oni sekvos la evoluon tie.

Alia bona novaĵo estas la malpermeso de licenco por ekspluati nafton proksime de la delto de la Amazono; ĉar tieaj mangrovaj arbaroj estas plenaj de biodiverseco, kaj lulilo de fiŝidoj, ktp.

(lau reta blogo „unearthed“ de Greenpeace.org)

- - -

2023-15-16 Informo-kunveno de la EP pri „Preter la kreskado“:

Jen la informo de Michael Leibman. La Esperanto-Komisiono de EELV (la verda partio de Francio) kune kun AVE invitas al Zoom-kunveno pri la temo „Preter la kreskado“:

Vi trovos alkroĉitan enkonduko a la temo kiu estis pritraktata en ĵus pasintaj tagoj en konferenco en la Eŭropa Parlamento. Mi faris la tradukon el la angla helpe de la Google tradukilo.

Quelques jours avant le début de cette conférence Philippe Lamberts, co-président du groupe Verts/ALE était interviewé à ce sujet (en la franca).

<https://www.youtube.com/watch?v=Q1MV1GoNWK0>

Ni (AVE kaj Eo-EELV) invitas diskuti pri la temo „Preter la kreskado“ je la 14a de Junio, 20:30 CEST (Pariza Tempo). Mi sendos al vi la ligilon kiam ĝi haveblas.

Pro tio mi proponas antaŭe iomete studi jenen vikipedion en Esperanto kiu enhavas pli ol 10 subtemoj.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Da%C5%ADripova_nekresko

- - -

2023-05-16 MercoSur-kontrakto havos negativajn flank-efikojn

Pri tiu kontrakto inter la sud-okcidentaj ŝtatoj de Sudameriko kaj EU oni laboras ekde 1999. Naturprotektantoj kaj aliaj CSO-oj protestis. Dum la tempo de la prezidento Bolsonaro okazis halto. Evidente nun oni trovis manieron ŝajnigi la tutan naturafabla; pere de aldona kontrakto pri naturo kaj socialaj aferoj. Laŭ juristoj kiuj estis petitaj de Umweltinstitut, tiuj aldonaĵoj ne vere ŝanĝas la originan kontrakton. Necesas daŭre postuli ŝanĝon de la tuta kontrakto. Jen

la informo de germana CSO (civil-sociala organizaĵo - kutime: NRO):

<https://umweltinstitut.org/welt-und-handel/meldungen/zusatzerklaerung-schuetzt-nicht-vor-regenwaldzerstoerung/>

ankaŭ la aŭstra CSO aktivas:

<https://www.global2000.at/mercosur-handelsabkommen>

--

2023-05-14 Tanzanio protektas sian maran naturon

Temas pri verdaj maraj testudoj kaj balenŝarkoj, kiuj estas leĝe protektitaj; tial iliaj nombroj stabiligis. Raporto en la germana:

<https://www.wwf.de/themen-projekte/meere-kuesten/meeresschutzgebiete/meeresschutz-in-tansania/walhaie-und-meeresschildkroeten>

= =

2023-04-28 „Libera lando“ por indiĝenaj kamparanoj en Braziljo.

La prezidento Lula da Silvo subskribis la dekretoj por 6 „novaj“ indiĝenaj teritorioj - entute pli ol 6000 kv-km.

Krome la nacia konsilio pri indiĝenoj, kaj la komitato por la mastrumado de terenoj kaj naturo en indiĝenaj teritorioj, denove komenas labori.

--

2023-05-06 Bonaj novaĵoj: la naturo revenas - ekzemple en Italio

Kunvivado kun ursoj, lupoj kaj homoj estas granda defio. Evidente en la montaro Abruzzoj oni sukcesis pri tio.

Gufoj uzas Steinbrücke in der Eifel, kaj iamaj sub-ĉielaj ekspluatejoj por bruna karbo (Lausitz / Lusitania) - ankaŭ ilia nutraĵo, kunikloj; krome malgrandaj bestoj kaj insektoj. Gufoj bezonas malferman terenon, do, se tie kreskas tro multaj arboj - ne plu taŭgas por gufoj. Tiaj naturaj paradizoj ankaŭ taŭgas por instrui rekte lernantojn pri naturaj fenomenoj. Aliaj ekzemploj el Usono, kie iam estis granda sen-natura industria regiono - kiu poste iĝis dezerto, kie pli kaj pli setlas sovaĝaj bestoj kaj birdoj.

En la franca kaj germana:

<https://www.arte.tv/de/videos/106243-010-A/gute-nachrichten-vom-planeten/>

2023-05 Pliaj informoj pri la kreskanta klimata katastrofo

Tiu paĝo havas tekstojn en Esperanto, sed la videoj kutime estas en la angla:

<http://neniammilitointerni.over-blog.com/2023/05/klimata-varmigo-varmfrapo-ce-la-supraĵo-de-la-oceanoj-estas-prokrasta-bombo.html>

2023-11-30/12-12 Tutmonda Konferenco pri la Tutmonda Klimato-krizon

ĉijare okazos en Dubai. Ĵus (2023-05-03) finis la q14a Petersberger Dialog en Berlin kiu preparas COP 28 por Dubai.

Jen la informo de la germana registaro:

<https://www.bundesregierung.de/breg-de/themen/erinnern-und-gedenken/petersberger-klimadialog-2023-2187380>

2023-07-28 La homaro sur Tero foruzis kio eblintus dum la tuta jaro por nia planedo

Por Germanio tiu dato estas je fino de Aprilo.

Tiel kalkulas NRO - en la angla:

https://en.wikipedia.org/wiki/Earth_Overshoot_Day

<https://www.footprintnetwork.org/>

Jen la germana instituto en Potsdam (en la germana kaj angla):

<https://www.pik-potsdam.de/en>

Kaj jen detala klarigo en Esperanto - pli aktualajn datojn vi trovas en aliajn lingvojn:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Ekologia_premsigno

= =

2023-05-02 Webinar Jutta Paulus, MEP - savi kaj rekrei marĉojn

jen videbla: Webinar en la germana "Abenteuer Moorschutz" mit Ann Christin Sieber und Alexander Kornelsen von

Mission to Marsh und

Lina Dilly von der Rewilding Academy bedanken.

Jen la ligilo, aktiva je Ĵaŭdo 04.05.2023 um 21:00 (Pariza somera tempo) : [hier](#) [abrufbar](#).

1. Rewilding (Lena ..) - ŝanĝi uzitajn iamajn marĉojn en marĉojn.

2. Ann-Christin und Alex Kornelsen

En la angla kun konciza video pri diversaj originaj marĉoj de Kanado - ĝis Usuhuaja - la plej suda urbo de Ameriko:

<https://www.missiontomarsh.org/>

Pitcher Plants (viando-manĝantaj plantoj), esplorado de univ. Laval en Kanado;

Okefenokee (= moviĝanta grundo), USA (15 mil da aligatoroj,) nigra akvo ;

Paramo, altaj marĉoj en Ekvadoro, torfo el 15 diversaj planto-radikoj;

Patagonien - Tompkins Conservation (gigantaj altaj marĉoj, kolektas trinkakvon), diversaj tipoj de sfagno.

4. Oni povas investi en Moorfutures, germana fonduso por stoki CO2 pere de rekreataj marĉoj. La financa profito venos de la CO2-certifikatoj, jen ilia retejo en la germana lingvo:

<https://www.moorfutures.de/>

-

Dua sendo estis pri libro en la germana „Das Moor“ de Franziska Tanneberger kaj Vera Schroeder, kiu laboras en „Greifswald Moorzentrum“ - proksime de Rostock je la Balta Maro.

Interesa temo kiun ni ĉi tie ĝis nun ne traktis estas paleo-ekologio de marĉoj, temas pri restaĵoj de plantoj, insektoj kaj ankaŭ homaj korpoj. En Grekio troviĝas marĉo kie la torfo havas profundecon de 130 m - ĉar torf-tavolo kreskas jare ĉ. je 1 mm, do temas pri tempospaco de 130.000 jaroj kiujn oni povas monitori tie.

- - -

La re-akvigo de iamaj marĉoj rapide helpas redukti CO2 eligojn, kiuj venas el sekigitaj marĉo-terenoj.

= =

2023 Copernicus - monitorado de tutmondaj parametroj de klimato

La satelita monitorado kaj la evaluado de tiuj datenoj (parte en Bonn) estas „tradukita“ al realaj situacioj en diversaj regionoj de nia planedo. Informoj en la angla kaj germana lingvoj.

<https://www.copernicus.eu/en/media/image-day>

2023-05-08 UN pri kaj por tutmondaj arbaroj

Jen 5 ĉefaj temoj de UN-DESA (pri ekonomio kaj socialaj aferoj) - legebla en la 6 laborlingvoj de UN:

<https://www.un.org/development/desa/un-desavoice/things-you-need-to-know/2023/05#5318>

= =

2023-04-24 Savu la Amazonion de Eŭropo: Polesio - bonvolu subteni la peticion

Oni planas akvovojon kiu ligas la Nigran Maron kun la Balta - la konstruo de tiu akvo-ŝoseo minacas kaj detruus multaj ankoraŭ treoriginalajn biosferojn !! Jam ekzistas la ligo inter la Nigra Maro kaj „Nordsee“ pere de kanalo de Danubo kaj Rejno. La kvanto da varoj estas relative malalta.

Jen la retejo de la NRO:

<https://savepolesia.org/the-threat/>

Jen la paĝo por subteni tiun peticion al la Europa Komisiono -

teksto en jenaj lingvoj (by, en, de, fr, pl, ru, kaj en la polesia dialekto/lingvo (?))

<https://www.change.org/p/raise-your-voice-to-save-polesia-europe-s-amazon-before-it-is-too-late>

- -

2023-04-22 Lumbrico terrestris - kaj la klimato

- esplorado pri la vivo en la tero, aparte la lumbrikoj

renaturigo de sekigitaj marĉoj en Skotlando

Dokumento en 6 europaj lingvoj

<https://www.arte.tv/de/videos/106260-000-A/im-reich-des-regenwurms/>

- -

2023-04-22 oranĝ-ruĝa fojno-papilio

Ĝi bezonas paŝtantaj bovinoj, sur herbejoj kiuj ne estas tranĉitaj/falĉitaj. Aparte necesas Regenburger Ginster - kie tiu papilio metas siajn ovojn.

dokumenta filmo montras kelkajn lokojn, la bezonatajn kondiĉojn:

<https://www.arte.tv/de/videos/107785-000-A/die-geschichte-vom-orangeroten-heufalter/>

- - -

2023-04 Cerrado - la savano en Brazilo - en danĝero.

Ĝi estas malpli protektata ol Amazonio; tamen same grava biosfero kaj klimata trezoro, ĉar ankoraŭ kolektas mule da pluvo kaj transdonas la humidecon. La malarbarigo ankaŭ tie daŭrigas - monitorita de PRODES - etendo de sojo-kamparoj daŭriĝas.

<https://www.wwf.de/themen-projekte/projektregionen/amazonien/cerrado/der-cerrado-braucht-hilfe>

Jen pri PRODES en la angla:

<https://www.globalforestwatch.org/blog/commodities/soy-production-forests-south-america/>

- -

2023-04-26 je 18:30 webinar (ret-informado) pri influo de metano al la klimato

Jutta Paulus, MEP, organizis tiun informadon (en la germana lingvo) kun vetero-specialisto Özden Terli.

Metano havas multe pli grandan efikon al la klimato ol CO2. Krom la malnovaj naturaj fontoj

nun multiĝis teknikaj de ekspluatado de fosilia nafto kaj metano. Tion oni povas redukti, sed kostas monon. Jen la invitilo:

https://us02web.zoom.us/webinar/register/2216817413776/WN_puDEKP5MRp-Pd_hYHGeZkA#/registration

Sed vi ankaŭ povas informiĝi pri tio en vikipedio - ankaŭ en Esperanto.

= =

2023-04-18 Peto de Eŭroparlamentanoj subteni naturon

la lobio de grandaj agrokonzernoj postulas rezigni pri pli fortaj naturprotektaj leĝoj, sed ili grandskale malvivigas la grundon, venenigas insektojn kaj fiŝojn. Venenoj ankaŭ eniras en la nutraĵojn de homoj kaj trinkakvo.

Jen peticio de ĉ. 10 EP-anoj de la frakcio Verduloj/Regionalistoj (Greens/EFA); la informo estas en 5 lingvoj - de, en, fr, it, nl:

<https://act.greens-efa.eu/no-nature-no-food?>

= =

2023-04-15 Germanio malŝaltis la lastajn atomreaktorojn (AR) - kio pri Finnlando kaj Pollando ?

je tiu dato oni finfine malŝaltas tiujn kiuj estis uzitaj por produkti kurenton. Ankoraŭ malmultaj funkcias kiuj ĉefe estas uzataj por esploroj, ekz-e en Geesthacht, kaj de firmao Siemens.

Ankoraŭ kelkaj plendas pri ĉi-tiu rezigno; inter ili la Liberala Partio, FDP, kiu plendetas por daŭrigo de atomcentraloj. La ĉefa argumento estas la klimato, ĉar nuklea energio eligas malmulte da karbondioksido.

Pollando ĵus mendis kelkajn atomreaktorojn el Usono kaj Suda Koreio je gigantaj kostoj.

En Finnlando - post longa prokrasto kaj plurfoje pli altaj kostoj - la nova EPR komencis produkti kurenton; ĉirkaŭ 14% de la nuntempe tutlanda bezono. Tie oni jam solvis la stokadon de radianta rubaĵo en rokaĵaj tuneloj - se iu scias detalojn, bonvolu sendi.

Komento de AVE/mw: Aliflanke FDP komplete kontraŭas limigon de rapideco sur aŭtoŝoseoj je 130 km/h - tiamaniere oni kalkulas rekte redukton de CO₂-eligon je 5% - de la tuta trafik-sektoro. Krome: limigita rapideco reduktus streĉajn situaciojn.

Pri AR en Pollando, ni vidos post 10 au 20 jaroj ĉu ilia decido funkcias; kaj post kelkaj mil jaroj ĉu ankaŭ la radioaktiva rubo estos bone stokita.

- - -

2023-04 ĝis Julio Insektoj ktp en natura ĝardeno

Du dokumentaj filmoj pri la vivo de kelkaj diversaj insektoj kaj aliaj malgrandaj bestoj (i.a. helikoj) en naturaj ĝardenoj:

<https://www.arte.tv/de/videos/092104-000-F/naturwunder-gemuesegarten/>

kaj jen aparte pri papilioj, inkluzive de teknikaj aspektoj de iliaj koloroj; gxis fino de 2025.

<https://www.arte.tv/de/videos/092973-000-A/schmetterlinge/>

- -

2023-04 Purigo de la Balta Maro per naturaj rimedoj

La germana ŝtata instituto GEOMAR en Kiel (je la Balta Maro) esploras ĉion pri la maroj: biosfero, bio-geologiaj cikloj, klimato, marfundo:

Jen scienca artikolo (ankaŭ en la angla lingvo) kiel uzi **Brunalgojn** (*Phaeophyceae*),

germane: Blasentang, ekzemple meti ilin je skafaldoj de ventogeneratoroj. Ili kolektas

nutraĵojn el la akvo - tiel purigas ĝin, kaj post la rikolto povas esti uzataj diversmaniere. Mi supozas ke tiaj algoj jam bezonas iom bonan akvo-kvaliton - almenaŭ klaran akvon. Mi rememoras libreton el Japanio kie malpurigo de la marbordo de forlavita grundo b blokis la kreskon de laminarioj.

<https://www.geomar.de/news/article/fuer-eine-bessere-wasserqualitaet-der-ostsee>
angle: Bladderwrack

<https://www.geomar.de/en/news/article/towards-a-better-water-quality-in-the-baltic-sea>
= =

2023-03 Strangaj arktaj krateroj pro klimata varmiĝo

Aparte sur la duoninsulo Jamal (Rusio-Siberio) kaj Alasko (Usono) ili aperis dum la plej varmajn jaroj de la kelkaj lastaj jaroj. Komune estas ke la ofte cirklo-formaj lagetoj enhavas multe da metano (CH₄) kaj eligas ĝin, kaj troviĝas en regiono de permafrost. Tiu frost povas atingi plurajn cent metrojn profunden.

En Alasko estas arbaroj kie la arboj ne plu staras vertikale, sed kliniĝas entute, ĉar la radikoj ne plu havas fortan grundon. Ankaŭ multaj domoj komencas kliniĝi. Ne ĉiujn oni povas transporti same kiel sledon.

Metano estas multe pli aktiva rilate la klimata varmiĝo ol karbondioksido. Oni mezuris (pere de izotopoj) ke tiu metano estas malnova je kelkaj milionoj da jaroj.

Tia retrokoplado (varmiĝo, degelo de permafrostaj regionoj, eligo de metano, plia varmiĝo - produkto de CO₂ el industrio, trafiko kaj milito, k.a.) signifas trafleksan punkton (angle: tipping point, germane: Kipp-Punkt) - de tie estos malpli facile reveni al la antaŭa situacio (malpli da forcejaj gasoj en la atmosfero):

Jen la dokumenta filmo en la ambaŭ lingvoj (de, fr) videbla ĝis 11a de Aprilo.

<https://www.arte.tv/de/videos/101934-000-A/die-geheimnisvollen-krater-der-arktis/>
= =

2023-03 Denove bankokrizo ? Ĉu sekvo de rapida interezo-altigo ?

Unue speciala usona banko (Silicon Valley) kiu evidente pruntis tro multe da mono al ŝtatoj. Pro la relative forta kaj rapida altigo de la nacia interezo - fakte por kontraŭi la inflacion*, tiu banko ne estis sufiĉe likvida. Bedaŭrinde pro la altigita interezo la valoro de tiuj „paperoj“ (pruntaĵoj) malaltiĝis - fakte momente ili ne estis vendeblaj por rehavigi al si la necesan likvidecon. Feliĉe, ĉikaze la usona registaro garantiis la monon; sed por la posedantoj de la akcioj de tiu banko rezultis giganta perdo.

*) La prezoj por fosiliaj resursoj jam de kelkaj jaroj altiĝis, aparte post la komenco de la milito de Rusio kontraŭ Ukrainio; Germanio kaj aliaj EU-landoj klopodis anstataŭigi naturan gason (metanon) kaj nafton el Rusio de aliaj landoj (Usono, Kanado, Norvegio, Saudi Arabio), tial tie altiĝis la prezoj.

Avantaĝe por Ĉinio kaj Hindio/Barato - ili nun ricevas la rusajn resursojn je malpli altaj prezoj.

Dum tre longa tempo la naciaj bankoj en Usono kaj EU (ktp) tenis la bazan interezon preskaŭ je nulo - inter 2014 kaj 2019 eĉ sub nulo ! Kaj nur ekde 2020 en ECB komencis altigi la interezon - tre rapide ene de 1 jaro al 2% preskaŭ samtempe kun ĉi-tiu milito (kiu plifortigis la inflacion).

Nun ankaŭ al Credit Suisse mankis libera mono (likvideco), sed t-e alvenis aliaj kaŭzoj: unuflanke gigantaj bonusoj (gigantaj jaraj krompagadoj al superaj dungitoj); aliflanke simile gigantaj pun-pagoj pro diversaj „aferoj“. Pro tio multaj klientoj reprenis sian monon de tiu banko. ... Pli pri tio je vikipedio, ekzemple:

https://de.wikipedia.org/wiki/Credit_Suisse

Konstato de AVE/mw: La baza interezo de la Eŭropa Centra Banko jam estas tro alta. La

efiko de altiĝo de la baza interezo montriĝas nur malrapide - tio signifas, ke la unuopaj paŝoj devintus esti malpli altaj. Oni jam vidas, ke ĝi ekzemple premas la decidojn konstrui loĝejojn; adicie al altigitaj resurso-kostoj alvenis altigitaj kostoj de financado. Do, la inflacio malpli estas kaŭzata pro pli luksa vivo, sed pro politikaj cirkonstancoj (i.i. milito). En Germanio mankas loĝejoj - aparte en grandaj urboj (kompleksa afero), sed la konstru-firmaoj hezitas investi en novajn projektojn pro tre altaj kostoj.

Samtempe la sindikatoj postulas pli altajn salajrojn por ekvilibri la altigitajn vivtenadajn kostojn. Kion fari por haltigi ĉi-tiun spiralon ?

- - -

2023-03-29 Vojaĝo en Skotlando - replantado de norda pluvarbaro

Fakte mi ne povis imagi ke Skotio estas tiom montara kaj grandparte sovaĝa natura regiono. Tiu dokumenta filmo, laŭlonge de la trajnvojo de Edinburgo per la „Royal Scotsman“ al la plej nordokcidenta loko (Magg ?) kaj iom pli per buso, ligas historion kun nuna tempo, inter alie produktado de lanaj ŝtofoj el la tieaj ŝafoj.

Ĉar dum longa tempo oni nur faligis arbojn en la montaro restis kvazaŭ dezerto. Iniciativo de kelkaj jaroj komencis replanti la „Kaledonian Arbaron“, kiel ĝi estis antaŭ 6000 jaroj.

<https://www.arte.tv/de/videos/105758-000-A/unterwegs-in-schottland/>

- - -

2023-03 Medikamentoj minacas la naturon

Pesticidoj bezonas informon pri ilia efiko en la naturo.

Medikamentoj gxis nun ne bezonas tiajn kromajn informojn. EU nun volas ke ankaŭ pri medikamentoj firmaoj esploras kaj publikas kio okazos al prenita medikamentoj - cxe homoj aux bestoj post la engluto. Poste oni ofte trovas ilin en la abakvoj, ecx post la trapaso de klariginstalajxo.

Ekzemploj pri tio:

Ethinylestradiol - kontraĉceptivo - trovigxis en kanada lago, kaj efikis same cxe la fisxoj, ne plu aperis fisxidoj.

Antidepresiva medikamento en sveda lago igxis pli kuragxaj, forlasis sian svarmon, kaj estis pli facile atakitaj.

En Hindio kamparanoj traktis bovinojn per Diclofenac. Birdoj, vulturoj, mangxis la kadavrojn, kaj mem mortis, cxar la medikamento malfunkciigis iliajn renojn.

(laŭ :Der Westallgäuer, 2023-03-04, V6)

- -

2023-03 videbla ĝis Junio: Dokumenta filmo pri ekspluatado de kobalto en Katanga ktp

Estas grandaj firmaoj el Ĉinio (i.a. filio de HUAWEI), krome po unu el Svisio kaj Usono, krome manlaboristoj, inter ili multaj infanoj, sub danĝeraj kondiĉoj. Ankaŭ la medio-poluado estas tre granda: polvo (sur kampojn kaj en la pulmojn) kaj poluita akvo - per metaloj kaj sulfuracido - kiun oni elmetas en la riveron. La sango de homoj montras tiajn poluadojn.

Ĉinaj firmaoj aĉetas la krudan produkton, la ĉefo de manlaboristoj protestas pro malhonesta pago-maniero. A.I. kaj privataj firmaoj monitoras kaj dokumentas la vojon de la minejo ĝis la merkato kaj produkto. Normoj ekzistas. Tamen mankas travidebleco, pro la turniĝ-punktoj - aparte tiuj en Ĉinio.

Ne nur temas pri ĉeno de liverado, sed ankaŭ ĉeno de korupcio; pro tio la lando Kongo nur tre malmulte enspezas el la p-oduktado kaj eksporto de kobalto. Glencore (Svisio) devis pagi punon de 1,1 miljardoj usonaj dolaroj pro korupcio kaj manipulado de la merkato.

Intertempe ankaŭ minejoj estas en Skandinavio. Ankaŭ tie okazis poluado pro difekto en la stokita poluita akvo. La fiŝoj reduktiĝis, krome la malmultaj kapititaj ne estas vendeblaj; la fiŝistoj ne ricevis kompenson. Intertempe Terrafame konstruis akvo-purigejon. Sed restas

risko. Sulfuro el la ŝtonaro oksidiĝas kaj tiel kreas sulfuracidon en la riveroj kaj lagoj, tie ne plu ekzistas vivo - fakte la kvanto de danĝeraj poluaĵoj estas multe pli granda ol la produktita kobalto. Necesus fermita cirkulado de la uzita akvo. Civitana asocio laboras por tio - ilia komuna kanto estas esprimriĉa. Ankaŭ en Kongo homoj kantante protestas.

Ĉar kobalto estas nur en malalta kvanto en unu baterio, kompleta reciklado necesas. La estonta bezono estas multe pli granda pro la ŝanĝo al elektrikaj aŭtomobiloj.

En 6 lingvoj: de, en, es, fr, it, pl; 1h 26 minutoj:

<https://www.arte.tv/de/videos/093032-000-A/kobalt-die-dunkle-seite-der-energiewende/>

- - -

Kaj jen dokumentado pri la tutmonda produktado de mikro-procesiloj (ĉips)

Taiwan estas la unua lando kiu en granda skalo produktis tiajn ĉipsojn. ankaŭ pro tio P.R.Ĉinio volas havi ĉi-tiun landon. Sed la komunisma Ĉinio neniam posedis Tajwan-on.

Intertempe multaj landoj investas produkti tiajn ĉipsojn (parte filio de la tajwana TSMC), por ne fali en tia dependeco, kiu montriĝis dum la Korona pandemio; ĉar tiam oni bezonis pli multajn, sed aliflanke la liverado ne sufiĉis.

Intertempe en EU oni ankaŭ investas pli forte: PDG / INTEL, INALCO (FR), Infineon, ASML, La celo estas teknologia suvereneco.

<https://www.arte.tv/de/videos/106721-000-A/die-megamacht-der-mikrochips/>

= =

2023-03 Ĉasado kaj Klimato - lagopo - angle: Red Grouse:

En Britio estas multaj marĉoj kaj nationalaj parkoj kiuj entenas marĉojn kaj erikejojn (en: heather moorland) Tiuj gravas pro la klimata milidiĝo, ankaŭ ĉar ili stokas CO2 (karbondioksidon). Sed ili ankaŭ estas gravaj biosferoj. Greenpeace (Verdpaco) nun kritikas ke la brita tradicio ĉasado iom kolizias kun tiuj bonaĵoj. Por ĉasi lagopojn (en: grouse) aŭ similajn grandajn birdojn, oni ekbruligas tiajn terenojn kutime antaŭ la ĉasado. Tio ne nur endanĝerigas aliajn vivantaĵojn tie, sed ankaŭ eligas grandan kvanton da CO2 - ne nur de la vegetaĵo sed pli grava de la torfo kiu devus stoki CO2-on.

<https://www.greenpeace.org.uk/news/surge-in-peatland-fires-in-uk-national-parks-just-weeks-before-climate-summit/>

(laŭ The Gardian kaj greenpeace.org.uk)

- -

2023-03-15 Vjosa - rivero-sistemo iĝas nacia parko :)

La akvofortaj projektoj Pocem kaj Kalivac ne ricevis la permeson; ĉar ili tute estus detruintaj la riĉan originalan biosferon. La foreloj povas vivi tie dank' al malvarma kaj oksigenriĉa fluanta akvo.

Naturafabla turismo taŭgus por protekti la biosferon kaj samtempe doni enspezon por la civitanoj tie.

Jen filmo pri Vjosa en la germana (28 min) - plurtaga scienca ekspedicio 2022 laŭlonge de la rivero, kiu komenciĝas en Grekio (la Aoo); kaj montras la valoron de tiu-ĉi unueca natura rivero-sistemo.

<https://www.youtube.com/watch?v=aNb91Va86m4>

= =

2023-03-08 Industrio ne rajtu kaŭzi mediajn krimojn

Ekzemple mortis multaj pingvenoj je la bordo de Peruo; ĉar okazis nafto-poluado (nafto-pesto) el sub-akva nafto-dukto kaŭzita de la konzerno Repsol, kiu rifuzas almenaŭ rekompenci ĉi-tiun damaĝon (eko-cidon). Pro tio WeMove initis peticion por la EU parlamento, kie okazos voĉdonado pri pli akraj leĝoj kontraŭ mediaj krimoj.

Por konvinki la EP-anojn WeMove petis subskribi ĉi-tiun peticion:

Jen la retejo en 6 eŭropaj lingvoj:

<https://act.wemove.eu/campaigns/oekoqid>

- - -

22-02-28 Civitana sukceso por protekti parton de la maroj

WeMove ankaŭ engaĝiĝas kontraŭ medio-damaĝantan fiŝkaptado sur la grundo de la maroj. Ĉar tiamaniere oni detruas grandajn areojn je la grundo kaj krome (ofte neintence) kaptas aliajn mar-bestojn (delfenojn, fokojn, koralojn, ktp) kiuj mortas en la retoj.

Aparte gravas se tio okazas en protektitajn regionojn.

EU intencas malpermesi la surgrundan fiŝkaptadon en maroj:

- en regionoj protektitaj sub Natura-2000. (ĝis Marto 2024);
- en ĉiuj aliaj ĝis 2030;
- en ĉiuj novaj protektitaj maro-regionoj tia surgrunda fiŝkaptado estu malpermesita.

<https://act.wemove.eu/campaigns/fischzucht>

= = =

2022-12-28 kiel stoki/reservi kurento-energion ?

Jen prezentaĵo pri diversaj manieroj produkti kurenton laŭ la bezono, eĉ se ne vendas/aŭ suno brilas.

grandaj baterioj, pump-lagoj, hidrogeno (dank al PV sur propra tegmento), impeto de rotacianta cilindro kiu tre rapide povas preni aŭ doni energion por stabiligi la frekvencon de 50 Hz, kondensatoroj. salo en alta temperaturo (inter 250 - 600 °C kio ebligas daŭre utiligi jam ekzistantajn vapor-turbinojn kiuj ĝis nun utiligas karbo-varmon, osmozo. elektrokemi Flow-Baterio ĉe Kemiwatt,

<https://www.arte.tv/de/videos/104830-000-A/superspeicher/>

- - -

Komento de Bardhyl:

Fakte la socialista registaro, kiu ekde 2013 kaptis ĉiujn registarajn kaj neregistarajn postenojn, kondukas kiel Dio en Albanio. Ĝia registaro faris multon malutilan ĝis nun . La flughaveno estas unu el tiuj frenezaj projektoj naturdamaĝaj, samkiel la elektra povostacio per sunradiado en la laguno de Karavasta, kio loĝas rara pelikano, same kiel ĉielsjrapuloj centre de Turana kaj mem la placo kio ŝanĝis la identecon de ĉefurbo kaj nelaste projekto por transformi havenon de Durres al turisma jaĥta centro. La neregistaraj organizaĵoj protestas sed jen la Konstitucia Juĝejo kaptita de socialistoj, eksaj komunistoj ne reagis konvene. Oni intencas konstrui grandan akvopovo-stacion sur la rivero Drin oriente de la lando kiu inundis tiom multe da agrotekto! La popolo bedaŭrinde trompiĝas de ties propagando kaj voĉdonas por ĝi!

Amike Bardhyl

- -

2023-02-16 Albanio komencis konstrui flughavenon por Vlora en regiono de Delto de Vjosa Temas pri laguno Narta kiu apartenas al al delto de Vjosa.

Tie estas grava loko por migrantaj birdoj; la konvencio de Bern postulas protekti tiajn biosferojn.

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Konvencio_de_Berno_\(1979\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Konvencio_de_Berno_(1979))

La Konstitucio-Kortumo de Albanio malakceptis la akuzon flanke de albaniaj naturprotektaj NRO-oj PPNEA kaj AOS:

<https://ppnea.org/save-vjosa-narta/?lang=en>

<https://ppnea.org/?lang=al>

<https://aos-alb.org/organizatat-mjedisore-padisin-institucionet-qeveritare-per-ndertimin-e-paligjshem-te-aeroportit-te-vlores/>

<https://www.euronatur.org/unsere-themen/aktuell/flamingos-oder-flugzeuge-proteste-gegen-flughafen-in-albanien>

ankaŭ en la angla:

<https://www.euronatur.org/en/what-we-do/news/flamingos-or-planes-protests-against-airport-in-albania>

EuroNatur petas subtenon por la jurista agado kontraŭ tiu medio-krimo el tuta Europo:

<https://www.euronatur.org/unsere-themen/vogelschutz-in-europa/fuer-zugvoegel-in-europaspenden>

= =

2023-02 Sudafriko troviĝas en atom- & karbo-kaptilo

Hans-Josef Fell kritikas la energio-politikon de Sudafriko, ili troviĝas je maltaŭga vojo. Ne-funkcianta atomenergia projekto kostas miljardejn, pro tio mankas mono por investi en alternativaj energioj. Sekve de tio okazas long-tempaj sen-kurento-horoj.

Oni investis en THTR (Torio-alt-temperatura reaktoro), pere tia Germanio iam eksperimentis - sen bona rezulto.

Ĉef-ministrino de Kapstadt, Helen Zille, komencis investi en alternativajn, sed la korupta prezidento preferis grandskalan teknikon (tiel oni eble ricevas pli da mono ol en multaj malgrandaj projektoj), kaj malhelpis la alternativajn.

Fell ligis al jena ĵurnalo - kiu kritikas ke atomenergia, sendepende de la tekniko (inkluzive de malgrandaj reaktoroj, SMR) ne helpas solvi la klimato-krizon, en la angla:

<https://thebulletin.org/premium/2021-07/can-small-modular-reactors-help-mitigate-climate-change/>

Apude: sur lia retejo ankaŭ troviĝas artikoloj en 17 lingvoj, inter ili unu en Esperanto (tradukita de AVE):

<https://hans-josef-fell.de/documents/#1527268863498-d7cb7dcf-7538>

- -

2023-02-12 aktuale - arbarfajroj en Ĉilio - sekvo de maltaŭga decido

Antaŭ 50 jaroj oni decidis en Ĉilio kulturi rapide kreskantajn arbojn por eksporti lignon kaj ligno-fibrojn por la tutmonda paper-industrio.

Simile okazis en Hispanio kaj Portugalio.

Oni ĉefe kulturis pinojn kaj eŭkalipton, kiuj subtenas tiajn brulojn.

Eŭkalipto unu-flanke elsuĉas multe da akvo el la grundo kio altigas la riskon de sekeco.

Aliflanke ĝi elspiras gason - kion ni ŝatas kontraŭ tuso - ĉi-tiu estas facile brulebla. Tiu specio eĉ bezonas arbar-fajrojn, ĉar nur je alta temperaturo - okaze de fajro - iliaj semoj eliras el la kapsulo.

La origina arbaro-miksaĵo kiu ekzistis antaŭe estas multe pli stabila kaj rezistema kontraŭ brulaĵoj.

Jen la aktuala informo:

<https://www.tagesschau.de/ausland/amerika/chile-waldbraende-105.html>

= =

2011-03-11 Fukushima ... Ĉernobyl
de germana retejo – parte ankaŭ en la angla:

<https://www.ausgestrahlt.de>

Jen ligilo al ekspozicio pri la du plej grandaj atomenergiaj/nukleaj katastrofoj:

<https://ausgestrahlt.pageflow.io/fukushima-tschernobyl-und-wir#292441>

Jen en la franca:

<https://www.sortidunucleaire.org/>

- - -

2023-02-01 Kiel redukti arbar-fajroj ?

En Hispanio iu forstisto kune kun lokaj homoj – malgrandaj kamparanoj – esploras manieroj formeti la nutraĵon por fajroj.

Necesas utiligi la areojn, ĉar ne-paŝtata herbejo donas sekan greson al fajroj; pinoj simile; sed foli-arboj estas malpli danĝeraj (pinoj enhavas facile ek-brulantan materialon – kvazaŭ okazas ĉenreakcio. Do, planti diversajn arbojn - ekz-e maron-arboj havas duoblan pozitivan efikon:

<https://www.arte.tv/de/videos/110465-000-A/spanien-wie-koennen-waldbraende-verhindert-werden/>

- -

2023-02 Estonteco por Ukraino - "sur bona vojo"

Jen kelkaj ekzemploj pri brila estonteco en Ukraino - homoj kiuj jam ek-kreas novan landon; ekzemple tre inteligenta reciklado, konverto de sekaj arbofolioj en papaeron, ktp..

<https://www.arte.tv/de/videos/111083-010-A/tracks-east/>

Komento AVE/mw: la nuna milito de Rusio estas, krom la kruelaĵoj kontraŭ la homoj, ankaŭ krimo kontraŭ la klimato: unue la brulantaj materialoj (nafto, domoj, rakedoj, bomboj), due la rekonstruado de tiom multaj konstruaĵoj ktp. kaŭzas grandajn CO2-emisiojn: je produktado de betono, fero, vitro kaj aliaj materialoj.

- -

2021-06 130 km da Aŭtoŝoseo voras la monon de Montenegro

Ĉinio ofertis konstrui aŭtoŝoseon en malfacila regiono - inkluzive de giganta ponto.

La konstru-laboro okazas sen sufiĉe da kontrolo (la konstruistoj poluadoas riveron).

Bedaŭrinde EU ĝis nun ne emas solvi ĉi-tiun problemon.

Ĉar Montenegro ne povas repagi la grandan krediton Ĉinio jam deziras ricevi denove havenon - simile kiel Piraeus - en la mediteraneo.

<https://www.arte.tv/de/videos/104128-000-A/montenegro-in-der-chinesischen-schuldenfalle/>

- - -

2023-02 Lula forpelas neleĝajn or-ekspluatantojn el Yanomami-regiono

en la regiono norda Amazonio laboris dank' al Bolsonaro ĉ. 25.000 da garimpeiros (or-ekspluatantoj). Ili ofte uzas hidrargon por pli efike preni la oron; sed tio severe poluadas la akvo-sistemon. Krome tio kaŭzas malsaton inter la Yanomami-indiĝenoj, ĉar ili estas ĝenataj kapti fiŝojn aŭ kultivi plantojn.

Jen informo en la portugala:

<https://www.greenpeace.org/brasil/blog/genocidio-indigena-garimpo-ilegal-esta-matando-criancas-yanomami-e-nao-e-de-hoje/>

= =

2023-01 detale pri marĉoj

La politika fonduso de la Verda Partio en Germanio - nomumita laŭ la fama aŭtoro Heinrich-Boell - eldonis kune kun NRO-oj BUND, Succow-Fonduso kaj Greifswald-Moor-Zentrum "Moor-Atlas". Ĝi enhavas 20 ĉapitrojn en la germana kaj ankaŭ ligilon pri la inform-fontoj (tiuj ofte en la angla lingvo, kelkaj de UNEP en 4 lingvoj: cn, en, es, ru):

<https://www.boell.de/de/mooratlas>

La avantaĝo de la digitala versio (kiu ne kostas) estas ke oni povas kopii tiujn font-indikojn kaj tuj ligi al ilia ret-paĝo; eblas aŭskulti podkaston en 3 ĉapitroj, ĉiu ĉ. 25 minutoj.

- -

2023-01-22 Muskoj - la unuaj plantoj sur roka grundo

Jen dokumento pri la kvalitoj de miloj specoj da muskoj. Dank' al ilia simpla genetiko ili povas elteni tre malfacilajn ĉirkaŭaĵojn.

Dana sciencisto planas transporti muskojn al la Mars-planedo, por tie krei pli viveblajn kondiĉojn.

En la franca kaj germana (50 min):

<https://www.arte.tv/de/videos/098859-000-A/moose-unscheinbare-helden/>

- -

2023-01-20 Biodiverseco de kampoj, erikejoj, mar-bordoj.

T.n. trudherboj, birdoj kaj bestoj kiuj vivas de trudherboj kaj de kulturitaj plantoj.

Plejparte la industria agrikulturo - ĉiam pli grandaj kampoj, malpli da interspacoj kaj heĝoj kiuj donis protekton al multaj bestoj kaj insektoj. Tie la uzado de herbicidoj pli kaj pli eliminas la trudherbojn. Do, necesas teni malgrandajn kaj prefere ekologie kulturataj kampoj.

La erikejo estas biosfero por sovaĝaj bestoj, lacertoj sed ankaŭ grandaj kiel cervoj, ankaŭ por multaj specifaj insektoj. Iamaj milit-ekzercejoj estas tre taŭgaj, ĉar tie homoj maloftas.

La vadaj regionoj - pli bone retenitaj ja la Balta Maro ol je la Norda (Germanio kaj Danlando) same signifas valoran biosferon. Denove la agrikulturo ĝenas pro tro alta kvanto da (artefaritaj) sterkoj/fekundenzoj, kiuj ĝenas la maran greson (infanejo i.a. por fiŝidoj), ilia ankaŭ venas de nitrogenaj kombinaĵoj el agrikulturo kaj el fuelo-motoroj.

(en la franca kaj germana):

<https://www.arte.tv/de/videos/095087-002-A/heimat-natur/>

2023-01-20 Vulkana grundo en Japanio provizas granda biodiverseco

Jen alia ekzemplo el Japanio, Vulkano Aso sur la insulo Kyushu.

Nova vulkangrundo necesas multe da nutraĵoj. Parte oni bruligas sekajn gresojn post la vintro kaj tiel donas cindron kaj mineralojn al la grundo (jare 16.000 ha). Evidente homoj faris tion dum jarmiloj, kion montras la fosado de la grundo. La tralaseblo de la grundo rezultas en multaj fontoj kun bonkvalita akvo (saĝe uzata).

En alta greso-herbejo multaj plantoj ne havas ŝancon, sed post la fajro ili havas sufiĉe da lumo kaj nutraĵoj. Post 1 monato kaskas diversaj herboj kaj estiĝas verdaĵo kie junaj bovinoj povas paŝti. Ĉar tie estas granda diverseco da plantoj ankaŭ la kvalito de tiu nutraĵo estas aparte alta. Interesa diferenco al eŭropaj herbejoj: la bovinoj marŝas sur memfaritaj padoj.

En la franca kaj germana (52 min):

<https://www.arte.tv/de/videos/095774-002-A/satoyama/>

Aparte belaj la ekflorado de diversaj flor-herboj, kaj ankaŭ la naskiĝo de bovido.

Kaj jen interesa retejo pri simila temo, en la japana kaj angla:

https://www.biodic.go.jp/ne_research_e.html#id06

= =

2023 ĝis 02-05 Denove pri revivado de la Kolorado-rivero / Jordano

Dum multaj jaroj la akvo de la Kolorado ne plu atingis la maron. Dank al ŝparado je akvo, dezerto-plantoj en la ĝardenoj aŭ golf-herbejoj de kaliforniaj urboj, rezigno de meksikaj agrikulturistoj pri akvo-rajtoj la rivero denove atingas la maron - plantado de ĉirkaŭantaj arbaroj ktp. ebligis la revivado de antaŭe dezertiĝanta areo.

Aktuale okazis gigantaj inundoj en Kalifornioj, mi ne scias ĉu ili atingis ankaŭ la Koloradon ? Jen en la franca kaj germana (52 minutoj).

<https://www.arte.tv/de/videos/065302-004-F/wasser-ist-zukunft/>

Arte.tv provizas plurajn dokumentajn filmojn pri akvo; ekzemple pri la Jorda-rivero inter Jordano kaj Israelo. Ankaŭ tie kolekti pluvon, kaj pli efike uzi la akvon oni revivigas la biosferon.

<https://www.arte.tv/de/videos/065302-005-F/wasser-ist-zukunft/>

--

2023-07-26 Kio estas komuna inter Mangrovoj kaj Esperanto ?

dank' al informo de Francois Lo Jacomo la 26-a de Julio estas la Tago kaj de Mangrovoj kaj de Esperanto !

Ambaŭ estas gravaj, sed ankaŭ ne-konataj de multaj homoj.

Certe mangrovoj estas ege gravaj: ili protektas la bordon kontraŭ mara erozio, kaj donas lokon por fiŝidoj ... do, grava temo, tutmonda.

Jen pluraj ligiloj kiujn sendis Humphrey Tonkin (iel reprezentanto de Esperanto ĉe UNESKO):

Jen la 6 plej gravaj detaloj pri mangrovoj - el ĉi-sekvaj ligiloj (nur en la angla):

1. Mangrov-arboj protektis vilaĝon en Tamil Nadu, Barato. Ili plantis 80.244 mangrovojn ĉirkaŭ sia vilaĝo, laŭ la marborda linio. Kiam en 2004 la granda cunamo frapis la bordon, la najbaraj areoj estis inunditaj, sed la vilaĝo restis preskaŭ nedifektita.
2. La plej granda mangrov-arbaro estas Sundarban en Okcidenta kaj partoj de ĉi-tiu arbaro estis deklaritaj de UNESKO Monda Heredaĵo.
3. „Blua Karbono“. Ĉi tiuj marbordaj arbaroj transformas atmosferan karbon-dioksidon en oceanaj sedimentoj. Tiamaniere agas kiel kerna ekologia reguligisto.
4. Salecaj folioj: Mangrovoj eltenas stresajn kondiĉojn kiujn la plimulto de arboj ne povas; kaj traktas la salecan marakvon liberigante la salon de la folioj kaj arbo-ŝeloj.
5. Koralo-blankiĝo: Mangrovoj preventas koralojn de blankiĝo, ĉar ili protektas koralo-speciojn..
6. Ili donas protektitan lokon por fiŝidoj kaj idoj de aliaj marbestoj.

<https://nationaltoday.com/international-day-for-the-conservation-of-the-mangrove-ecosystem/#:~:text=International%20Day%20for%20the%20Conservation%20of%20the%20Mangrove%20Ecosystem%2C%20celebrated,sustainable%20growth%20of%20mangrove%20forests>

Jen pli detale kaj ankaŭ ofertas inform-afiŝoj; en la 6 lingvoj de UN - se vi unue iras al unesco.org:

<https://www.unesco.org/en/days/mangrove-ecosystem-conservation>

= =

2023-01 > 2023-05 Nia nutrado kaj cerba sano

Pluraj esplor-institutoj laboras pri ĉi-tiu grava temo. Bona nutraĵo estas: multe da legomoj, fruktoj kaj nuksoj, oleo kiu enhavas Omega-3 grasoacidojn, fiŝoj kaj malpli da viando, kaj aparte prefere malmulte da sukero. Sukero efikas en la cerbo same kiel drogo. Vitaminoj kiuj troviĝas en tia bonakvalita nutraĵo tre gravas por la kunlaboro inter la nervoj.

Jen dokumenta video (53 min) en la jenaj lingvoj: en, es, de, fr, it :

<https://www.arte.tv/de/videos/082725-000-A/unser-hirn-ist-was-es-isst/>

- -

2023-01 Ekologie afablaj kulturado de floroj

ekz-e poto el kanabaj fibroj, kiu estas preskau same malpeza, sed malkomponiĝas en la grundo ene de 2 jaroj. Ankaŭ temas pri substituo de torfo, ĉar tio minacas la naturajn marĉojn - la paludikulturo povas produkti la saman substraton, sed supozeble je pli altaj kostoj.

Ili ankaŭ kultivas orkideojn, samtempe protektas kaj replantas tiamaniere ke rekreiĝas natura pluvbaro en Borneo.

<https://www.meinwoody.de/>

- -

2023-01 ĝis 12a Akvo - Jen video de Arte.tv pri la Bajkal - pri la naturmedio de la akvo kaj de la ĉirkauaĵo - en la germana:

<https://www.youtube.com/watch?v=Cuu5-X1RPYo>

Ĉe Arte.tv nur videbla ĝis la 12a de Januaro - ankaŭ en la franca

<https://www.arte.tv/fr/videos/048886-001-A/la-vie-secrete-des-lacs/>

- -

Se ni jam estas je la temo akvo, jen informa video ĝenerale pri la tutmonda akvocirkulado - subgrunda fluo al la rivereto Orbe en la svisa ĵurasa montaro; en la franca kaj germana (43 min):

<https://www.arte.tv/de/videos/078341-001-A/wasser/>

- -

2023-01-04 Veneno minacas la Vistulon

lama kemia kaj militara fabriko de Zachem en Bydgoszcz, norda Pollando, formetis danĝerajn kemiaĵojn en la grundon. Virino nun esploras la sekvojn. iamaj laboristoj rakontas, raportas pri oftaj mortoj pro canceroj pro tiaj kemiaĵoj. Relative multaj homoj en tiu regiono havas malbonkvalitan „sango-bildon“.

Supozeble ankoraŭ nun en la aero estas spuroj.

Simile kiel en sudas Alsaco (de Stokamine) ankaŭ ĉi tie la grundakvo estas poluita - kiu povos atingi la Vistulon.

Fakuloj elmetas grundakvon - nigra, malbone odoranta, kaŭteriza.

Lageto proksime de la Vistula jam entenas tiajn kemiaĵojn.

La administracio komencis pripensi ...

Renata Wlazik batalas por redukti la minacon al la homoj, al la naturo kaj al la Vistulo - bedaŭrinde oni ne ŝatas ŝian agadon, ŝi estis maldungita. Ŝia patro laboris en ĉi-tiu fabriko.

Ŝi atendas la subtenon de la katolika episkopo tie; espeble li konas la enciklopedion „Laudato Si“ (2015 de la nuna papo) kaj subtenas ŝian agadon.

Jen la ligilo - en la franca, germana kaj pola lingvoj:

<https://www.arte.tv/de/videos/104426-015-A/re-verseucht-und-vergiftet/>

= =

2023-01-02 Peticio kontraŭ Glifosato en EU

La frakcio de Verduloj & Regionalistoj lanĉis tian peticion, ĉar post 5-jara permeso kiu nun finis, EFSA petis novajn informojn de la industrio.

Tio signifas, ke dum ĉi-tiu jaro 2023 ni povas denove lanĉi peticion por finfine malpermesi la uzon de glifosato (en 6 lingvoj: de, en, es, fr, it, nl):

<https://act.greens-efa.eu/glyphosate>

Kaj jen pli detalaj informoj pri Glifosato (en 12 EU-lingvoj - vi devas serĉi la kapvorton „GMO“, OGM, ...):

<https://www.greens-efa.eu/de/campaigns/gmo>

--

2022-12-31 Protesto kontraŭ uranio el Rusio al germana uran-fabriko en Lingen

Vladimir Sliviak de la rusa organizaĵo Ecodefense, 2021 li ricevis la Alternativan Nobelpremion kune kun 3 aliaj - en multaj lingvoj:

https://en.wikipedia.org/wiki/Right_Livelihood_Award

La lasta liverado de pliriĉigita uranio okazis en Januaro 2022, la permeso de ĉi-tiu liveraĵo estis de 2021. Sed nun la germana registaro - ministerio pri ekologio - povus malpermesi la transporton en la kanalo inter la Balta kaj la Norda Maro. Krom le ĝeneralaj riskoj de atomenergio estas du aliaj argumentoj: la ŝtata firmao Rosatom profitas de ĉi-tiu laboro, kaj samtempe Rosatom regas kontraŭleĝe la konkeritajn atomreaktorojn en Ukrainio.

Ligilo de la ekzil-rusa asocio - kaj iliaj paĝoj en la rusa, elektebla ankaŭ la angla kaj germana:

<https://ecodefense.ru/>

<https://ecodefense.ru/category/english/>

Jen la aktuala informo en la germana:

<https://www.ndr.de/nachrichten/niedersachsen/Lingen-Atomgegner-fordern-Stopp-von-russischem-Uran-Transport,urantransport100.html>

--

2022-12 Tanganjika-Lago - ekologio de besta kaj homa uzado

Dokumenta video pri la biodiverseco, dum 1h 30 min. en la franca kaj germana:

Ĉi-tiu lago tre similas al Bajkal en Siberio, laŭ informo de Vikipedio ambaŭ estas same longaj 673 km (??), kaj ambau estas tre profundaj, pli ol 1400 m.

Tiu profundeco signifas ke ili estas je la limo de dis-moviĝantaj kontinentaj pecoj.

<https://www.arte.tv/de/videos/094445-000-A/tanganjikasee-das-blaue-herz-afrikas/>

--

2022-12-10 - 2023-04-13 Esploro de glacio-dinamiko sur Grenlando, kiel sekvo de klimata varmiĝo

Esploristoj mezuris surloke kaj trovis ke intertempe dum somero pluvas, tio kaŭzas ke la glacio malkreskas.

Meltanta akvo profundiĝas la fendoj, kiuj pligrandiĝas. Tiu akvo je la grundo de la glaĉero kvazaŭ ŝmiras la glaĉeron, kiu sekve de tio pli rapide moviĝas en direkto al la maro.

Sed ili ankaŭ trovis likvan lagon sub la glacio, kion ili ne supozis. Tio signifas, ke la glaĉero povas forŝoviĝi pli rapide, kiam okazas plia varmiĝo. Tio estas unu el la „Kipp-punktoj“ - t.s. ke post ties aktivigo, estos nebla reveni al la sama punkto - kreiĝos nova ekvilibro. Simila povas okazi ankaŭ en Antarkto.

Dokumenta filmo, 54 minutoj, en la franca kaj germana.
<https://www.arte.tv/de/videos/093651-000-A/into-the-ice/>